

Bulgara **ESPERANTISTO**



ENHAVO

N. Aleksiev. Kun fiero kaj konvinko	1
* * * Soveta respubliko enkondukas Esperanton	2
* * * El Alvoko al la bulgara popolo	3
* * * Kultura lumfonto por la slavaro	5
V. Hančev. Balado pri la homo (trad. R. Georgieva, D. Ŝiŝkov)	7
I. A. Krilov. Lupo en hundejo (trad. L. Miĥajlov)	8
O. Pĉelinska. Mia entrepreno (trad. E. Vaskova)	8
D. Borisov. La cigano Ĥristo	9
K. Vălev, C. Todorov, B. Drenski, D. Novakov, R. Pavlova. Semajno de Internacia Amikeco	13
Ŝ. Geneva. Kun bonaj rememoroj kaj amikaj sentoj al Bulgario	15
V. Ivanova, K. Kavarĝikov, N. Bojaĝiev, B. Drenski, M. Deskov, T. Vălev. Organiza vivo	16
* * * Jubilea Literatura Konkurso	18
* * * II-aj Internaciaj Esperanto-Kursoj en Rodopi-montaro	19
M. Ĉolev. Angel Minkov Ĉopev	20
* * * Tra la E-Mondo	22
N. Kavenius. Letero el Finnlando — la kongreslando en 1969	23
K. Slomkovska. I-a tutpola kurso por gvidantoj de skolttrupoj „Amikeco“	24
A. D. Atanasov. Por bona uzado de la Internacia Lingvo	25
D. Jurukov. „Metodiko de la instruado de Esperanto“	29
* * * Nia poŝto	30
L. Bojaĝieva. Omaĝo	31
V. Vereŝĉagina. La entreprenema Svetlana	31
Ran Bosilek. Petolemaj manetoj (trad. D. Ŝiŝkov)	31
* * * Distroj	32
* * * Koncize	32
Sur la kovrilpaĝo: Tuturba kunveno okaze de la Semajno de Internacia Amikeco en Sofio	

Pro teknikaj kaŭzoj — ŝanĝo de la alteco de la literoj en la presejo — n-roj 3 kaj 4 grave malfruiĝis. Tial ili aperas kune, en duobla n-ro. Ni petas pardonon!

Abonkotizo: jara — 1,40 levoj, duonjara — 0,70 lv. Por eksterlando — 2 lv., 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,60 lv. Por Italio — 1000 liroj. Aparta numero — 0,14 lv. Reklamtarifo: 0,15 levo por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv; korespondanconoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

ENLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Ing. Cefo Fico, R. Kongresi Permetit 7—11/10, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru. Bossong, Floraplein 2, Eindhoven.

RUMANIO: Miĥail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bukaresti 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, Ŝuhova ul. D. 5/7 kv. 44, Moskva, M—162.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 103.



KUN FIERO KAJ KONVINKO

Ni, la bulgaraj esperantistoj, kun fiero kaj konvinko en la hela estonteco de nia Patrio legis la Alvokon publikigitan per la gazetaro, radio kaj televido lige kun la kvaronjara jubileo de la socialisma revolucio en nia lando (1944—1969).

Ni estas fieraj, ke dum relative mallonga periodo nia Patrolando transformiĝis el plej malevoluinta eŭropa lando, subpremata de la grandaj imperiismaj potencoj, en bone evoluintan socialisman ŝtaton kun moderna industrio kaj maŝinigita koopera terkulturado, kun senpaga medicina helbo, larĝa reto da ĉiuspecaj lernejoj, en kiuj studas ankaŭ miloj da eksterlandanoj el ĉiuj partoj de la mondo, en ŝtaton, kie malaperis la analfabeteco. Ĉiujare pli ol du milionoj da turistoj el eksterlando vizitas Bulgarion por ferii ĉe la marbordo, en la montaraj ripozejoj aŭ en famaj kuraclokoj. Ili estas atestantoj de tiu grandioza, ĉiuflanka kaj rapida evoluo, mirinda por la dimensioj de malgranda, ĝis antaŭ jardekoj malriĉega lando. Ne estas malproksima la tago, kiam Bulgario okupos lokon inter la plej evoluintaj ŝtatoj en la mondo. Nun nia popolo konstruas la maturan socialisman socion, kreante ĝian potencon materialan kaj teknikan bazon. Poste fariĝos reala la transiro al konstruado de la plej alta fazo de la homa socio — la komunismo.

La bulgaraj esperantistoj, kiel parteto de sia popolo, vivas kun ĝiaj zorgoj kaj idealoj. Ni, unualoke, laboras ĉiutage por la plenumado de la taskoj, realigataj en fabrikoj, uzinoj, laborejoj, institutoj, lernejoj kaj institucioj, kie nia „diligenta kolegaro“ plenumas sian profesion devon. Tiamaniere ni praktike realigas, ĉiu en sia laborloko, la koncernan parton de la nacia konstruplano por ĉiu jaro, por ĉiu kvinjaro. Kaj kiam ni konstatas la atingitajn sukcesojn, ni eksentas naturan fieron, ke ankaŭ ni enportis nian obolon en la tutpopolan trezorejon per la streboj de niaj mensoj kaj niaj muskoloj.

Dualoke, la bulgaraj esperantistoj, kiel ardaĵ pacdefendantoj, konatigas la tutmondan esperantistan publikon — kaj pere de ĝi ankaŭ larĝajn neesperantistajn mediojn — kun la fruktoj de la paca laboro de bulgaraj laboristoj, kamparanoj kaj intelektuloj en la kreado de pli komfortaj vivkondiĉoj, kiuj donas eblecon konstante altigi la kulturon de ĉiu aparta civitano kaj de lia familio. La vero pri nova Bulgario atingas en multajn punktojn de la terglobo kaj altiras novajn mediojn rilati amike al socialisma Bulgario, malgraŭ la malica, mensoga kaj trompa propagando de la reaciaj medioj en kapitalistaj kaj aliaj landoj.

Agante tiamaniere ni, bulgaraj esperantistoj, gajnas la simpatiojn de la laboruloj, kiuj vidas en niaj vicoj ardajn patriotojn kaj internaciistojn.

Ni ricevas la aktivan subtenon de ŝtataj kaj sociaj organoj kaj organizaĵoj, ĉio donas al ni novajn materialajn kaj spiritaĵajn fortojn en la disvastigo de Esperanto en diversaj tavoloj de nia popolo.

Ni elkore dankas al la Bulgara Komunista Partio kaj al la Popola Registaro de Patrolanda Fronto, al ĉiuj ceteraj organizaĵoj kaj organoj, kiuj sincere subtenas nian noblan aferon.

Jen kial ni promesas publike, ke ni multobligos niajn klopodojn por la realigo de ĉiuj taskoj, planitaj dum la jubilea jaro, kaj renkontos por dudekkvina foio la neforgeseblan por nia popolo daton Naŭa de Septembro 1944 per novaj atingajoj.

Al pli aktiva laboro, karaj gekamaradoj, por uzi la eblecojn, kiujn donas al ni Esperanto, en la intereso de la demokratio, socialismo, socia progreso kaj paco sur la tuta terglobo!

SOVETA RESPUBLIKO ENKONDUKAS ESPERANTON

Unu el la respublikoj de la Unio de Sovetaj Socialismaj Respublikoj, nome la Litova S. S. R., ĵus enkondukis la instruadon de la Internacia Lingvo Esperanto en siajn mezgradajn lernejojn. Ĝis antaŭ nur kelkaj monatoj neniu lernejo en Soveta Unio instruis oficiale la lingvon.

La nova decido, anoncita per aparta 40-paĝa broŝuro de la Litova Ministerio de Klerigo en 3000 ekzempleroj, rezultigis urĝan bezonon de instruistoj. Tamen jam 19 lernejoj povis komenci la instruadon, kaj la nombro sendube kreskos rapide.

Laŭ la nova programo, Esperanton povas lerni la klasoj 7-a ĝis 11-a. La instruado estas fakultativa, t. e. oficiala, sed ne deviga por ĉiuj lernantoj. La oficiala kurso konsistas el 52 lecionoj po 1 1/2 horoj semajne. La ministeria dokumento atentigas, ke la In-

ternacia Lingvo estas la lingvo „plej rapide lernebla el ĉiuj lingvoj de la mondo“ kaj ke ĝi donas bonan bazon por posta lernado de aliaj lingvoj. En la momento instruas Esperanton ĉirkaŭ 600 lernejoj tra la mondo.

*Intern. Gazetara Servo,
№ 178/1969*

ESPERANTO-ASOCIO KANDIDATO POR NOBEL-PREMIO

(IGS/688) *Stockholm.* — Universala Esperanto-Asocio, organizaĵo kun sidejo en Rotterdam kaj kun membroj en pli ol 80 landoj, estas proponita kiel kandidato por la ĉi-jara Nobel-Premio por la Paco pro meritoj sur la kampo de internacia kompreniĝo. La proponon prezentis 38 membroj de la Sveda Parlamento apartenantaj al diversaj politikaj partioj. Identan proponon faris ankaŭ pluraj membroj de la Itala Parlamento kaj aliaj kvalifikitaj personoj.

Без да желая да бѣда пророк, аз съм убеден, че есперанто действително ще играе голямата роля, която е вдъхновявала неговия гениален създател д-р Заменхоф: да стане могъщо средство за сближаване и разбирателство между най-далечни народи. Неговото изучаване в училищата принася безспорна полза: по най-лек начин открива пред ума на детето вътрешното логично устройство на един език.

Проф. д-р Йосиф Фаденхехт



AL LA BULGARA POPOLO OKAZE DE LA 25-a DATREVENO DE LA NAŬSEPTEMBRA SOCIALISMA REVOLUCIO

La socialisma sociordo ĉe ni eniris la jaron de sia kvaronjarcenta jubileo. Ĉiu civitano kaj civitanino, ĉiu familio, ĉiu laborkolektivo el fabrikoj kaj uzinoj, el kooperativaj kampoj, el institutoj kaj oficejoj, ĉiuj bulgaraj gepatriotoj renkontas kun grandega ĝojo kaj entuziasmo la alvenantan tutpopolan feston de la libereco.

Dudek kvin jaroj forpasis de la memorinda tago — la Naŭa de Septembro 1944, kiam la bulgara popolo, gvidita de la Komunista Partio, unuigita sub la standardo de la Patrolanda Fronto kaj per la decida helpo de la Soveta Armeo, forbalais la monarkofaŝistan diktaturon kaj establis propran popoldemokratian regadon. Estis malkovrita nova erao en la dektrijarcenta historio de nia antikva lando. Bulgario direktiĝis sur la vojon de l'socialismo.

La dudek kvin jaroj de popola regado estas jaroj de socialisma industriigo de la lando, de konstruo kaj disvolvigo de la ĉefaj kaj plej gvidaj fakoj de la ekonomio — energetiko kaj metalurgio, maŝinkonstruado kaj kemio. Bulgario, lando de ligna plugilo kaj mokasenoj, transformiĝis en industriigitan landon kun multnombra alte kvalifikita laborista klaso, kun spertaj inĝenieroj, teknikistoj kaj konstruistoj. La kreo de la nuntempa industrio estas unu el la plej grandaj akiraĵoj de la socialisma revolucio, kiu ĝisfunde ŝanĝis la karakteron kaj la strukturon de nia ekonomio.

Historian heroaĵon faris niaj vilaĝanoj, kiuj unuaj en la mondo postsekvis la ekzemplon de la sovetaj kolĥozanoj kaj reorganizis la vilaĝan mastrumon je socialismaj reloj. Kiel malproksima rememoro restis la interkampaj limoj, pro kiuj oni verŝadis

fratan sangon, la kadukaj dometoj, malriĉeco kaj malprogreso, kiuj sufokadis la bulgaran vilaĝanon. La baraĵlagoj kaj elektraj linioj, la traktoroj kaj kombajnoj, la novaj lernejoj kaj legejoj, la hejmecaj kaj helaj domoj, la radio kaj televido esence ŝanĝis la aspekton de nia vilaĝo. Brile konfirmiĝis la ĝusteco kaj viveco de la kooperativa plano de Lenin kree aplikita de la Bulgara Komunista Partio al la kondiĉoj de nia lando.

Heredinte la plej bonajn demokratiajn tradiciojn de la pasinteco, la socialisma kulturo kaj belarto same kiel la popola klerigo transformiĝis en potencon faktoron por konstruado de la nova, socialisma socio. La kulturaj riĉaĵoj estiĝis propraĵo de la tuta popolo. La plej progresema ideologio, kiu estas konata en la mondo — la marksismo-leninismo, kaptis la konscion de la popolamasoj en socialisma Bulgario, malkovris novajn, helajn perspektivojn antaŭ la kreantoj de la scienco, kulturo kaj belarto.

La socialismo estiĝis ora epoko por la evoluo de la bulgara ekonomio kaj kulturo, por la plialtigo de la popola bonstato, por la impeta disflorado de nia Patrolando.

La plej granda akiraĵo de la socialisma revolucio ĉe ni estas la nova homo, liberigita el la kapitalisma ekspluatado kaj subpremo, reganto de sia lando, konscia kreanto kaj konstruanto de sia vivo. Hardita kaj kreskinta en la bataloj por la plenumo de la kvin kvinjaraj planoj, gustuminta la ĝojon de pluraj sukcesoj kaj venkinta multajn malfacilaĵojn, li ligis nedisigeblan estontecon al la grandaj idealoj de la komunismo.

Forta kaj nerompebla estas la idea-

politika unueco de nia popolo. Ĝi estiĝis potenca forto de nia socia evoluo.

Firma bazo por la evoluo de Bulgario sur la vojo de la socialismo estas la sincera kaj nerompebla bulgara-soveta amikeco. Ĝi delonge superis la kadrojn de la kutimaj ligoj inter du amikaj landoj, estiĝis senco, sorto kaj moralo de nia popolo.

Socialisma Bulgario senĉese strebas al paca solvo de la diskuteblaj demandoj, por likvido de la fajrujoj de streĉeco kaj konfliktoj en Eŭropo kaj en la mondo, por baro de ĉiu agreso kaj atenco kontraŭ la liberamaj popoloj.

Hodiaŭ en la mondo ekzistas danĝeraj fajrujoj de streĉeco, kiuj minacas la pacon kaj la sekurecon de la popoloj. La reakciaj fortoj malhelpas la normalajn internaciajn rilatojn kaj kunlaboradon, puŝas la mondon al danĝeraj aventuroj. Ĉefan kulpon pri tio portas la internacia imperiismo ĉefrunte kun Usono, kiu uzas arogan militagreson, ekonomian kaj politikan premon, diplomaciajn ĉantaĝojn kaj ideologian subfosadon. La interesoj de ĉiuj popoloj

postulas la unuiĝon de la pacaj kaj liberecaj fortoj, la plifortigon de la kontraŭimperiisma fronto. Nia Popola Respubliko daŭrigos ankaŭ estonte en intima amikeco kun Sovetunio kaj la aliaj socialismaj landoj, en kunlaboro kun ĉiuj pacamaj fortoj en la mondo firme rezisti al la imperiismo kaj la internacia reakcio, por malsukcesigiti ties agresemajn planojn.

Karaj gesamnacianoj!

Ni esprimas nian firman konvinkon, ke ĉiuj komunistoj kaj unuiĝintaj agrarpartianoj, ĉiuj membroj de la Patrolanda Fronto, viroj kaj virinoj, gejunuloj, ĉiuj homoj de la fizika kaj intelekta laboro, ĉiuj bulgaraj gepatriotoj, entuziasmigita de la ĝisnunaj sukcesoj, donos sian tutan kreaĵon energion, la flamon de sia revolucia entuziasmo en la tutpopola movado por inda renkonto de la glora jubileo de la libereco. Ni estas profunde konvinkitaj, ke vi montros miraklojn de labora heroeco kaj atingos novajn venkojn okaze de la 25-a datreveno de la Socialisma Revolucio en Bulgario.

CENTRA KOMITATO DE BULGARA KOMUNISTA PARTIO

ESTRARO DE BULGARA AGRARANA POPOLA UNUIĜO

NACIA KONSILANTARO DE PATROLANDA FRONTO

CENTRA KONSILANTARO DE PROFESIAJ UNUIĜOJ

CENTRA KOMITATO DE DIMITROVA KOMUNISTA JUNULARA ASOCIO

Докато хората не заговорят на един език, който да бъде общ за всички и чрез който да се види, че най-великите хора из целия свят са имали най-чисти и великодушни сърца, изпълнени с милосърдие, дотогава те няма да гледат на подобния си като на брат и няма да има едни да живеят на гърба на други, нито пък у народите ще има тази алчност да покоряват, защото най-лесно ще виждат страданията си. Есперанто — това е новото откритие на Америка и той има най-голямото право на съществуване, за да изпълни тази велика задача — да стопли и смекчи коравите човешки сърца.

Адриана Будевска, артистка



La kreo de slava skribo kaj slava literaturo estas heroaĵo kun historia signifo. La danka bulgara popolo ĝin gloros eterne. La nomoj de Konstantin la Filozofo, nomata ankaŭ Kiril, kaj lia frato Metodij estas kronitaj per eterna tutpopola amo, transdonata de generacio al generacio tra la jarcentoj.

La 13-an de februaro j. k. en Sofio, antaŭ la Nacia Biblioteko „Kiril kaj Metodij“, sur la loko, kie oni starigos monumenton de ambaŭ fratoj, okazis majesta mitingo, kiun partoprenis ĉirkaŭ 100 000 geurbanoj. Ĉi tie nun oni starigis specialan honorpladon. Inspiroplenan paroladon faris la prezidanto de la Komitato de Arto kaj Kulturo Pavel Matev, elstara nuntempa bul-

gara poeto. Interalie li diris:

— Antaŭ 11 jarcentoj, la 14-an de februaro 869 j., en Romo ĉesis tre frue la tera vojo de Konstantin la Filozofo, nomita ankaŭ Kiril.

Ĉi-jare kune kun la bulgara popolo laŭ decido de UNESKO la popoloj en la tuta mondo celebros solene la 1100-an datrevenon de la morto de Kiril, pli ĝuste de lia senmorteco.

Talentaj idoj de la bulgara-slava loĝantaro de Tesaloniko, posedantaj tre altan por sia tempo klercon, kun sia tuta spirita esenco ambaŭ fratoj estas preparitaj por la grandega afero, al kiu la historio destinis fari returnon en la kultura evoluo de la eŭropaj popoloj. Ilia 9-a jarcento estas mal-

facila jarcento. Difinita per eklezia kanono, la trilingveco estas la plej severa diktato de l'epoko. Sed ni, la slavaro kaj la homaro, ne devas forgesi kaj ne forgesos, ke ĝia unua krevo estis ago de la du slavaj filoj. Kreinte la slavan skribon, inventinte alfabeton, kiu respondas al ĉiuj fonetikaj specifikaĵoj de nia lingvo, ili konkeris oreolon de unuaj batalantoj kontraŭ la dogmatistoj el Okcidento. La alfabeto de Kiril prezentas tutecan sistemon por originala grafika transdono de la tiama slav-bulgara parolo. Tio estas nova skribo, kun sia stilo kaj esenco, kiu kvazaŭ enkluzivas la reliefon de la Balkano, la trankvilon de la kamparo, la kanton de la birdoj kaj la spegulojn de la riveroj.

Egala laŭ senco al tiu afero estas la traduko de la mesaj libroj fare de Kiril kaj Metodij. Tio estas la granda komenco de la tutslava literaturo. En Okcidento simila returno venos kelkajn jarcentojn pli malfrue. Ĝefri Ĉoser(Jafry Choser) verkos siajn unuajn versaĵojn en anglan lingvon en la dekkvina



Kiril — Konstantin la Filozofo

jarcento; komence de la dekseca jarcento en Germanio Martin Luther tradukos la Biblion en germanan lingvon; en Francio Fransoa Vĵon (François Villon) en la dekkvina jarcento rifuzos la teologiajn dogmojn kaj preparos la vojon de la franca lingvo en la oficialan literaturon.

Tial ni povas nomi Kiril kaj Metodij antaŭuloj de la Renesanco.

Krei literaturon en popola lingvo dum unu frua epoko, fari tiun lingvon literatura — tio estas grandega progresema afero. Oni devas esti noviganto en plej alta grado, por ribeli kontraŭ la sanktigataj dogmoj. Tiaj novigantoj estis la du fratoj.

„Aŭskultu nun, tuta slava popolo, — skribas Kiril:—kiel sen lumo ne estas ĝojo por la okuloj. . . . tiel ne ekkonos ĝojon ĉiu senliteratura animo. . . .“ „Nudaj estas la popoloj sen libroj, ĉar ili ne povas batali sen armilo kontraŭ la malamiko de niaj animoj. . . .“

Kia homeca kredo en la eblecoj de la popoloj, kia batalpozicio, kia filozofia humaneco kaj konvinkeco, ke la spirita vivo savos la homon el ĝia barbareco, nobligos kaj plialtigos lin!

Kaj kial ne fieri, ke en la historia ĉielo de Bulgario brilas tiaj sunoj! Kiel ne senti fieron, ke nia Patrolando donis akcepton kaj subtenon al Kiril kaj Metodij, ke ĝi transformiĝis en kulturan lumfonton por la slavaro! Tio estis natura kaj logika vojo. Tiu-tempe Bulgario estas la nura organizita slava ŝtato. Malantaŭ si ĝi havas preskaŭ dujarcentan sendependan ekzistadon kaj enviindan prestiĝon. En ĝi maturiĝis la kondiĉoj por granda literatura-kleriga movado.

La bulgara tero konservas la heredaĵon de riĉaj pasintaj kulturoj. Unuvorte, nia nacia disvolviĝo, kulturaj tradicioj kaj organizado de ŝtata vivo favoras la grandan returnon. La afero de Kiril kaj Metodij venkis, ĉar estis Bulgario. Sed ni povas diri plenrajte, ke ankaŭ Bulgario venkis, ĉar ĝi havis

la aferon de la du fratoj. Kaj neniam nin forlasis kaj neniam nin forlasos la historia fiero, ke la bulgara patrio fariĝis lulilo de la slava kulturo. La memoro pri Konstantin la Filozofo — Kiril kaj pri Metodij estas konstanta memorigo pri Bulgario, memorigo, kiu ne disigas, sed proksimigas nin al la aliaj slavaj popoloj. Ĉar tiu ĉi afero fariĝis ilia, fariĝis tutslava afero. Ĝi fariĝis faktoro en la evoluo de la slavaro, forĝis novajn ligojn inter la slavaj popoloj. Ĝi estis, estas kaj estos simbolo de proksimiĝo inter ĉiuj, kiuj kreas la slavan kulturon, simbolo de unueco inter la slavaj popoloj, inter ĉiuj popoloj, kiuj kreas progreseman kulturon. Jam 11 jarcentojn Bulgario gloras siajn unuajn instruintojn kaj instruintojn de la slavaro. Kliment Ŭhridski komparis ilin kun matenstelo, kiu brilas pli forte ol la suno. Ĥristo Botev nomis ilian tagon (la 24-an de majo — *noto de Red.*) „festo, kiu devas nin entiziasmigi per la ideo pri plena spirita kaj politika liberiĝo.“

Pri ili Vazov kantis kun patriotisma entuziasmo: „Ke ni ankaŭ donis al la mondo ion kaj al ĉiuj slavo — alfabeton nian.“ Starigita antaŭ la faŝista tribunalo en Leipzig, Georgi Dimitrov deklaris: „Longan tempon antaŭ la epoko, kiam la germana imperiestro Karlo V diris, ke li parolas germanlingve nur al siaj ĉevaloj, kaj la germanaj nobeloj kaj kleruloj skribis nur latine kaj hontis pri la germana lingvo, en „barbara Bulgario“ la apostoloj Kiril kaj Metodij estis kreintaj kaj devastigintaj la malnovbulgaran literaturon.“

Ĝuste en tiu ĉi avangarda rolo de la bulgara literaturo kaj en ĝia kontribuo al la tuthomara kulturo ne unu generacio de batalantoj trovis apogon kaj kredon. Kaj ekstaris sur la kultura horizonto de Bulgario, en la dramecaj jaroj de ĝia historia vojo la pala figuro



BALADO PRI LA HOMO

de Veselin Hančev

Tutsola en frosta neĝblanka arbar',
du noktojn la homo sin trenis.

Kaj diris l'arbaro: „Jam mortos vi, ĉar
vund' gravas. . . ĉu vi ne komprenis?

Vi mortos. Kaj via taĉment' estas for.
Nek ŝirmo, nek voj' tra la neĝo“.

Silentis la hom' kaj en tiu ĉi hor'
nur rampis per lasta fortstreĉo. . .

„Nu haltu! — ripetis l'arbar' kun aplomb'.—
En mia sin' restos vi morta!

Jen — falis ĉe vin rapidfluga kolomb',
rigida pro l'frosto, senforta.

Ĉu savos vin vi el la neĝocean',
se frostas eĉ birdoj kaj grundo?“

Kaj haltis la hom'. La kolomb'on per man'
li kaŝis ĉe sian brustvundon.

Pro l'sang' varmigita, la bird' kun ekjet
subite flugilojn eksvingis

kaj fluge atingis, kun ĝoja impet',
eĉ kien la hom' ne atingis!

*El bulgara: Rosica Georgieva
Dinko Ŝiŝkov*

de la monaĥo Paisij, la klara frunto
de la poeto geniulo Ĥristo Botev, la
impona eksterajo de Ivan Vazov, la
puraj okuloj de Ĥristo Smirnenski, la
mortepafita brusto de Nikola Vapcarov.
Ekstaris centoj da talentaj idoj de la
Patrolando, adeptoj de l'afero kaj la
ideoj de Kiril kaj Metodij.

Kvaronjarcenton jam socialisma Bul-
gario marŝas laŭ sia socialisma vojo,
lumigita de la granda idealo de l'komu-
nismo, inspirita de la celo konstrui
socion de alta materiala kaj spirita

kulturo. Kaj kreigas nia riĉa socialisma
kulturo, nia inspirita komunisma arto,
varmigita ne nur de la lumo de
nia nuntempo, sed ankaŭ de la mal-
proksimaj radioj de la bulgara-slava
kulturo, kie unuaj inter la unuaj brilas
Konstantin la Filozofo kaj Metodij.
Niaj verkistoj estas feliĉaj de la kon-
scio, ke ili servas al granda ideo, ke
la plej humana, la plej progresema kaj
granda kulturo — la kulturo de la ko-
munismo — kreigas per tiu alfabeto,
kies komenco estas sub nia ĉielo.



Fablo de I. A. Krilov

Provante sin enŝovi nokte en ŝafejon,
 La Lupo trafis la hundejon.
 Ekflaris tuj l'enŝovon de l'ŝtelisto
 La tuta hunda aro en la stalo
 Kaj furioze saltis, preta por batalo.
 Aŭdiĝis krioj: „Kaptu la rabiston!“
 Momenton — kaj la pordo estis jam fermita.
 La ejo eksimilis al infero nevidita.
 La homoj kuras: iu kun batilo,
 Alia kun fusilo.
 Alkuris tria kun la lumigilo.
 La lupo sidas, sin preminta en angulo,
 Per dentoj li grincegas, hirtiĝas per hararo,
 Disŝiri kvazaŭ ĉiujn volus la aĉulo.
 Vidante tamen, ke ne estas antaŭ li ŝafaro,
 Kaj komprenante, ke jam venis la momento
 Ekstari antaŭ juĝ' severa,
 Ŝajnis sin kaptita li de bona sento
 Kaj ekparolis per la jena voĉ' tenera:
 „Pro kio tiu ĉi alarmo kaj nepacienco?
 Veninta estas antaŭ vi amiko kaj parenco.
 Mi venis por paciĝo kaj kun sento plej sincera.
 Forgesu ni kverelojn jam pasintajn.
 Kaj mi ne nur ne tuŝus la ŝafarojn ĉi tieajn,
 Sed ĝoje gardos ilin kiel idojn plej obeajn.
 Jen mi konfirmas per solena ĵuro,
 Ke mi. . .“ — „Aŭskultu vi, najbaro —
 Lin interrompis l'estro de l'hundaro. —
 Konataj estas al mi lupa ĵuro kaj naturo.
 Pro tio ĉiam sekvas mi modelon:
 Kun lupo finas mi kverelon
 Nur demetinte lian felon.“
 Ne pasis eĉ momento —
 Kaj de la lupo restis nura spuro.

El rusa: Ljubomir Miĥajlov

MIA ENTREPRENEJO

de Olga Pĉelinska

Ĉiam mi ridas, kiam oni diras pri mi: „Ŝi nenie laboras, ŝi estas dommastro!“ La homoj ja ne konas mian entreprenon. . . Vere, en ĝi ne estas uzata libro de ĉeestantoj, mankas difinita labortempo. Mia laborkontrakto ne estas farita laŭ la laborkodo, sed laŭ la kutima rajto. Pro tio mi ne havas libertempon kaj min ne protektas la profesia unuiĝo. Mi pretendas esti ĉefo, sed mi estas nur ordinara laboristino, malgraŭ mia multjara labor-

profesio kaj respektiva kvalifiko. Kaj mia agado estas tre diversspeca, eĉ tia, por kiu oni postulas superan klercon!

Mi komencas labori ordinarie je la sesa horo. Dum la tuta labortago neniu anstataŭas min. Ĉiumatene mi sportas levante pezajojn: mi elportas el la kelo sitelojn plenajn de ŝtonkarbo, bruligas la fornojn kaj faras iujn pli facilajn purigaferojn. Poste mi rekvalifikiĝas en aĉetanto kaj dommastroprovizanto. Mi aĉetas diversajn, ha-



vante ĉiutage komercajn rilatojn kun solidaj entreprenoj: „Lakto, viando kaj fiŝo“, „Pano kaj farunaĵoj“, „Fruktoj kaj legomoj“ ktp. ktp. Priservante la matenmanĝon mi ŝanĝiĝas en keltero. Poste mi estas jam majstro kuiristo, lavisto, gladisto, kudristo, riparisto kaj trikisto, malgraŭ ke mi ne finis la respektivajn teknikumojn. Ofte mi plenumas ĉiujn ĉi oficojn samtempe. Tagmeze mi estas ĉefo de manĝejo kaj lavisto de manĝovazoj. Posttagmeze mia kvalifiko tuj plivastiĝas — mi estiĝas instruistino: solvas taskojn, korektas hejmajn ekzercojn de literaturo, pri-demandas historion, geografion kaj ankoraŭ aliajn lernobjektojn. Mi lernas eĉ solfeĝon kaj asimilas la gramatikon de tri okcidentaj lingvoj, ĉar mia filino lernas italan, kaj miaj filoj germanan kaj francan lingvojn. Iam (ho, tio ĉi ankaŭ okazas!) mi ŝanĝiĝas en flegistino: bandaĝas vunditajn infangenuojn, enigis gutojn en la nazon, surmetas kupojn, sinapojn kaj kompresojn. Ĉe familiaj miskomprenoj mi prezentas la juĝpotencon, punas kaj entreprenas rebonigojn. Mi provas eĉ leĝofaradi: „Lavu viajn dentojn antaŭ enlitiĝo!“ „Ne eniru hejmen kun ŝuoj surpiede!“

Vespere mi estiĝas ankaŭ. . . artistino: kantas, deklamas, rakontas fa-

belojn, aranĝas kolektivajn legadon, ludojn kaj amuzojn.

Mi havas okazojn ofte ripari elektrajn kuirilojn, gladilojn, elektroŝirmilojn, eĉ naftajn fornojn. Kaj ĉu nur tio ĉi? Mi estas kaŝa kaj malkaŝa konsilanto ĉe multaj demandoj, kunsentas zorgojn kaj ĝojojn kaj ofte mi fariĝas fulmoŝirmilo de mia kolerinta en sia oficejo kunulo en la vivo.

Tie ĉi, kompreneble, mi ne raportos pri mia „bagatela“ socia agado kiel kasisto de patrolandfronta organizaĵo, de respondeculo pri nia loĝejo (domestro), de partoprenanto en ĉiuj kvartalaj studrondoj, kursoj kaj similaj. Tio ĉi estas agado ĝuste por neokupitaj en entrepreno personoj kiel mi.

Ĉu ne estas interesa la laboro en mia entrepreno? Mi jam havas dudekjaran praktikon, sed pension mi ne atendas...

Mi tre ridas, kiam oni diras, ke mi laboras nenie! Kaj mi deziras ekkrii: „Konsenta mi estas eklabori aliloke, ĉiuloke, por ke mi povu ripozi?“ Tiam mi havos la rajton ricevi ripozkarton de la profesia unuiĝo, kaj mia kompatinda edzo ne plu ĉagrenos, irante sola al ripozo somere.

El bulgara: Elena Vaskova

LA CIGANO KRISTO

Originala rakonto de Dimitr Borisov

— Saluton, Borko! Kiel vi fartas?

— Saluton! Ĉu vi estas Petko Lazarov?

— Jes, la sama. Kien vi iras?

— Mi ne havas difinitan celon. Mi promenas.

— Pli ol du jarojn mi estas jam pensiulo kaj mi posedas novan loĝejon. Mi petas, venu ĉe min gaste.

Li brakumis min kaj ni ekiris al lia domo. Lazarov estas mia iama samler-

nanto en la gimnazio. En tiuj jaroj ni tre amis unu la alian, sed poste la vivo disigis nin kaj longan tempon ni ne renkontiĝis.

Dum la marŝado li rakontis, ke li edziĝis post sia trideka jaro kaj nun havas filinon kaj bofilon kuracisto.

Ni eniris la vestiblon de sunluma nova apartamento. Renkontis nin lia tre afabla edzino. Ŝi restis mallongan tempon ĉe ni kaj eliris. Longe ni ba-

bilis kiel malnovaj amikoj. Lia edzino denove venis, regalis nin per kafo kaj buterkuketoj kaj eliris por fari siajn hejmajn laborojn.

Trinkante la kafon, mi rimarkis sur la muro tri portretojn. La unua prezentis personon vestitan malriĉege, sur la vestaĵo — multaj flikaĵoj. Apud ĝi — alia portreto de la sama homo, tamen en eleganta kostumo. Sub ili — tria foto, de junulo. Montrante ilin, mi demandis:

— Versajne memoraĵo, ĉu ne?

— Jes! La juna homo estas mia bofilo kaj la persono kiu estas en malriĉa vestaĵo maldekstre kaj en riĉa — dekstre, estas lia patro.

— Mi ne komprenas vin bone!

— La pasinteco de mia bofilo estas tre interesa kaj samtempe malgaja.

— Bonvolu rakonti ĝin — mi petis lin scivoleme.

Li ekrigardis min fideme, fintrinkis la kafon kaj komencis:

— Mia bofilo estas tro konfidema al mi kaj ŝatas miajn konsilojn. Li ĉiam adresas sin al mi per „paĉjo“. Li ankaŭ scias, ke mi amas lin kiel patro. Iun tagon, kiam ni estis solaj, li diris al mi:

— Paĉjo, vi scias kiel sincere mi estimas vin. Ĉu mi povas rakonti al vi pri mia pasinteco en ĝia vera stato? Sed mi petas, ne ofendiĝu, se ĝi ombros vian familian nomon!

— Rakontu, do, kaj nenio vin ĝenu — mi respondis.

Li esplorrigardis min, kvazaŭ dezirante ekscii, ĉu mi parolas la veron, kaj poste komencis:

— Kiam mi estis kvinjara, mia patrino mortis. Mia patro tiam havis dudekok jarojn. Ĉar li estis en sia matura aĝo, post unu jaro li denove edziĝis. Mia duonpatrino estis vidvino kun filo. Baldaŭ mi fariĝis fremda en la domo kaj sub la influo de mia duonpatrino mia patro, por liberigi sin de mi, transdonis min al kelkaj ciganoj,

kiuj ofte vizitis lian drinkejon en la vilaĝo D. Li estis drinkejmastro. Mi ekamis unu el la ciganoj, nomatan Ĥristo. Li ankaŭ ekamis min patre kaj ni dividis ĉiam kune niajn ĝojojn kaj malĝojojn. Li estis tro malriĉa, sed bonkora homo.

Iun someran tagon kun grupo da ciganoj kaj dresita urso ni vizitis la foiron en mia naskiĝvilaĝo. Ni haltis antaŭ la drinkejo de mia patro. Cigano ludis per violonaĉo, samtempe kantis kaj devigis la urson plenumi diversajn ŝercludojn, kiuj ridigis la publikon. Poste mi demetis mian ĉapelon kaj petis la vilaĝanojn ĵeti en ĝin monerojn. Alproksimiĝinte al mia patro, mi tamen estis forpelita de li kaj la tuta cigana grupo forlasis la drinkejon. Jam sepjara, mi komencis vizitadi la lernejon. Mia dua patro per peniga laboro kiel dungito ĉe kampoposedantoj aĉetis lernilojn kaj zorgis pri mi, kvazaŭ mi estis lia samsanga filo. Mi komencis voki lin „paĉjo“. Tio ĝojigis lin, kaj li sentis sin la plej feliĉa homo. Kiam mi estis en la kvina klaso, dum la ferioj mi laboris ĉe kampoposedantoj aŭ kiel laboristo. Mia dua patro instruis min plekti korbojn, kiujn mi forportis kaj vendis en la urbo. Mi komencis helpi lin, ĉar miaj bezonoj de tago al tago fariĝis pli grandaj, kaj kontentigi ilin ne estis laŭ liaj ebloj. Tiel mi studis en la gimnazio.

Tamen la zorgoj de mia dua patro ne finiĝis per tio. Li bone komprenis mian strebon al studado. Iun tagon li donis al mi cent levojn kaj sendis min en la ĉefurbon por studi medicinon. Tiam mi sentis min kvazaŭ fluganta kaj kisis lian frunton.

En Sofio mi amikiĝis kun studentoj, kiuj havis la saman malriĉulan sorton. Tage mi studis kaj vespere mi laboris kiel kelnero.

Mi devas konfesi antaŭ vi, mia kara bopatro: kiam Ĥristo vizitis min en la ĉefurbo, lia ĉeesto tro embarasis min.



DANKON, K-DO DIMITR IVANOV EL PLOVDIV!

Ĝis la 10. XII. 1968 nia sindona kaj senlaca samideano Dimitr G. Ivanov el Plovdiv (str. „Stranĝa“ 4) sukcesis kolekti la jenajn abonkotizojn por 1969 j.: por „Bulgara Esperantisto“ — 88, por „Ripozoj“ — 8, por „Internacia Ĵurnalisto“ — 3, por „Nuntempa Bulgario“ — 2.

Post la Nova Jaro li sukcesis abonigi ankoraŭ 7 personojn al „BE“, do entute por 1969 j. k-do Ivanov kolektis 95 abonkotizojn por la asocia organo. Menciinda estas ankaŭ la fakto, ke li jam kolektis 88 membrokotizojn por 1969 jaro.

Ni dankas al vi, kamarado Ivanov! Kaj ni tutkore bondeziras al vi sanon kaj feliĉon por atingi novajn sukcesojn sur la nobla Esperanto-kampo.

Gesamideanoj el la tuta lando, sekvu la modelan ekzemplon de k-do Dimitr Ivanov el Plovdiv! Por la kuranta jaro restas ankoraŭ liberaj kolektoj de „Bulgara Esperantisto“. Varbu novajn abonantojn kaj sendu tuj la monon al la asocia kancelario! Tio nun estas gravega tasko! Tasko solvebla — kaj solvenda!

La redakcio de „Bulgara Esperantisto“

Verdire, mi estis disduigita en miaj sentoj: unuj memorigis al mi, ke mi devas esti danka al tiu ĉi amoplena al mi homo, kaj la aliaj — ili malkuraĝigis min fari tion, ĉar mi timis mokridon fare de la homoj.

De tempo al tempo mi ricevis de mia dua patro pakaĵojn kun nutraĵo aŭ poŝtmandaton. La sumo fakte estis ĉiam modesta, sed kompare al liaj eblecoj ĝi estis grandega.

Spite al ĉiuj malfacilaĵoj mi sukcese finis la studadon kaj estis enoficigita en mia naskiĝvilaĝo D. kiel kuracisto. Tuj mi rekonis mian veran patron, tamen li estis forgesinta min, eble la jaroj tro ŝanĝis min.

Mi diros kelkajn vortojn pri mia vera patro. Lia dua edzino estis ruza kaj profiteza virino. Ŝi sukcesis konvinki lin transdoni sian tutan havaĵon al ŝia infano.

— Mi ne deziras vian havaĵon por

mi, ĉar mi amas vin, sed pripensu la estontecon de nia infano — ŝi aludis al li, kaj fine li estis venkita.

Tamen tiu ĉi infano estiĝis viro kaj kun sia patrino forpelis mian patron. Tiam li fariĝis ilia kampservisto.

Unu tagon oni invitis min esplori lin, ĉar li malsaniĝis. Mi trovis lin kuŝanta sur pajlo en lignoĉambreto apud la stalo. Post mia kuracista esploro li petis pardonon, ke li ne havas monon kaj ne povas aĉeti la kuracilon. Tiam mi eliris, aĉetis ĉion kaj reenirinte, metis ĉion kun cent levoj sur la malnovan keston, kiun li uzis kiel tablon. Tio lin surprizis. Li okulfiksis min kaj per apenaŭ aŭdebla voĉo demandis:

— Filo mia, ĉu vi estas?

— Laŭ sango, jes! Sed en mia koro estas alia patro — la nobla cigano Ĥristo. . .

Li provis kisi mian manon, flustrante:

— Filo mia, pardonu min. . . Grandan pekon mi faris rilate vin. . .

Mia respondo estis severa:

— Mi plenumas mian homan devon, sed vi delonge ĉesis esti mia patro.

Kaj elirante, elekstere mi aŭdis liajn plorsingultojn. . .

Kelkajn monatojn post mia translokigo en Sofion mi eksciis, ke li mortis. Onidiroj rakontas, ke tri-kvar horojn antaŭ la vivofino li premis en tremantaj manoj foton de sia familio: li kaj lia unua edzino, tenanta en la manoj min, dujaran infaneton. Li ĝemis kaj flustris:

— Filo mia, filo mia, pardonu al via patro!

En Sofio, kiel kuracisto, mi edziĝis al via filino.

Antaŭ unu semajno mi ricevis leteron de mia dua patro. Interalie li skribas, ke li estas malsana kaj volas vidi min. Mi komprenas, ke lia sanstato ne estas bona. Jam ses tagojn mi tute ne povas dormi. . . Kion mi faru nun? Kia estos via konsilo?

— Vi devas forveturi kaj venigilin ĉi tien. Li meritas tion—estis mia konsilo.

— Kaj poste?

— Poste li restos ĉe ni por ĉiam kiel nia parenco.

— Sed ĉu li ne malhonorigos nian familion. . . Ja li estas cigano. . . — memorigis mi.

— Tute ne. . .

Tiam mia bofilo forveturis kaj la sekvintan tagon venigis la ciganon. Enirante nian loĝejon, lia dua patro timeme trapasis la sojlon. Mia filino renkontis lin tre afable, kisis lian manon kaj frunton. Ni ĉiuj akceptis lin kiel veran parencon.

Ĥristo ne povis elteni kaj ekploris. Tra liaj larmoj brilis feliĉo. . .

Li restis ĉe ni ĝis la fino de sia vivo. Bedaŭrinde post kelkaj monatoj lia malsano grave malboniĝis kaj li mortis kiel feliĉulo.

Nun mia filino estas graveda. Se ŝi naskos filon, lia nomo estos Ĥristo. . .

En tiu ĉi momento la pordo malfermiĝis kaj sur la sojlo aperis juna geedza paro.

— Jen miaj filino kaj bofilo — diris mia iama samlernanto.

— Vi estas konsciaj kaj bonkoraj homoj, kaj mi sincere gratulas vin! — mi diris.

Post duonhoro mi forlasis tiun ĉi dankeman familion. Irante hejmen, mi demandis min, kiel mi agus, se mi estus en simila situacio. Ĉu mi havus la kuraĝon esti sufiĉe bona kaj honesta? . . .

Post tri monatoj mi ricevis telegramon:

„Mia filino naskis filon. Mi petas, estu lia baptopatro. Lazarov“

PRI ESPERANTO EN SOVETA JURNALO

Magomet Isaev, kandidato de la filologiaj sciencoj, kiu partoprenis la 37-an Kongreson de la Bulgaraj Esperantistoj en Varna (1968) kiel oficiala delegito de la sovetaj esperantistoj, publikigis specialan raportaĵon, titolitan „La mondo legu Kosta-n“ en ĵ. „Socialistiĉeskaja Osetija“ (5. IX. 1968). La aŭtoro rakontas siajn impresojn pri la Kongreso, pri niaj lando kaj popolo kaj notas la grandajn sukcesojn de la bulgara E-Movado. Fine li rakontas ankaŭ pri siaj renkontiĝoj kun la elstara E-verkisto Asen Grigorov. Isaev speciale notas

la viglan intereson de Grigorov al Kosta Hetaĝurov, revolucia demokrato kaj granda poeto fondinto de la osetia belarta literaturo. Ravita de la poeto, Grigorov estis dirinta:

— Mi kuraĝas proponi al vi la jenon. Ni devas traduki lian „Osetian liron“ en Esperanton, tiamaniere oni en la tuta mondo legu la grandan Kosta-n. . .

El la tuta raportaĵo de Magomet Isaev ŝprucas amo al la bulgara [popolo,] al la bulgaraj esperantistoj.

**LA SEMAJNO
DE INTERNACIA
AMIKECO
EN BULGARIO**



Bonege pasis la Semajno de Internacia Amikeco en nia lando. En la redakcion de „Bulgara Esperantisto“ venis informoj pri tio el pluraj lokoj. En ligo kun la Semajno estis organizitaj centoj da solenaj kunvenoj kun paroladoj kaj belartaj programoj, aranĝitaj E-ekspozicioj kaj montrofenestroj, pendigitaj miloj da sloganoj kaj murgazetoj, publikigitaj dekoj da materialoj en la gazetaro, skribitaj amase leteroj al amikoj trans la limoj. Bulgara E-Koopera-

tivo eldonis 4 specojn de poŝtkartoj kun konvenaj surskriboj kaj sloganoj en Esperanto.

Ĉio ĉi montras, ke la iniciato de UEA organizi Semajnon de Internacia Amikeco estas bona kaj aktuala. Ĝi trovis varman akcepton kaj subtenon en nia lando. Do, tiu ĉi iniciato devas fariĝi belega ĉiujara tradicio tutmonde.

Ĉi-sube ni donas koncizajn informojn pri la Semajno nur en kelkaj loĝlokoj

LA SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO EN SOFIO

La Semajno komenciĝis per inaŭguro de filatela ekspozicio ĝuste la 16-an de februaro matene en la Centra Poŝtejo. Ĝin aranĝis la Landa Komitato por la Semajno kaj la Bulgara Filatelista Asocio. Estis prezentitaj poŝtmarkoj kaj kovertoj de E-korespondado el la tuta mondo. Frunte de la ekspozicio staris grandlitera surskribo: „Per Esperanto — al paco kaj amikeco inter la popoloj“. Sur aparta tabulo — la penso de l' granda amiko de Esperanto Romain Rolland: „Por ke la popoloj povu interkompreniĝi, ili devas antaŭ ĉio havi eblecon kompreniĝi“.

Frato pendis standardoj: la nacia — blanka-verda-ruĝa, la blua — de l' paco, kaj la verda, la Esperanta. Tutan semajnon la ekspozicio altiris la atenton

de miloj da civitanoj, junuloj, gelernantoj, infanoj.

Dum la Semajno ĉiuj 8 E-societoj en la ĉefurbo okazigis specialajn kunvenojn. Antaŭ multnombra kunveno de la plej granda tuturba E-societo „Maksim Gorkij“ pri la Semajno parolis la prezidanto de Bulgara E-Asocio k-do Nikola Aleksiev.

Samtempe la Distrikta-Urba E-Komitato organizis brilan tuturban kunvenon, kiun vizitis invitite ankaŭ reprezentantoj de la batalanta por libero kaj nacia sendependeco vjetnama popolo. Paroladon pri la internacia amikeco kaj la Semajno faris k-do Hristo Gorov — vicprezidanto de CK de BEA. La karaj vjetnamaj gastoj rakontis pri la barbara milito de Usono en Vjetnamio kaj pri la

heroismo de la vjetnama popolo defende al sia patrolando. Fine artistoj de Bulgara E-Teatro plenumis belartan programon. Pri la kunveno raportis Radio Sofia kaj la Bulgara Televido.

Originala aranĝo dediĉe al la Semajno estis la Vespero de la Belarta E-Verkaro en la Sofia Universitato. La Vesperon organizis la Studenta E-Societo „V. Peeva“ kaj la Instruista E-Societo „Diĉo Petrov“. Legis siajn verkojn E-verkistoj el ĉiuj generacioj, unuigitaj en la Sofia Literatura E-Rondo: Ljuba Bojaĝieva, Nevena Nedelĉeva, Asen Grigorov, Venelin Mitev, Miĥail Ŝekerĝiev, Violin Oljanov. Siajn tradukaĵojn legis Ivan Dobrev kaj Ljubomir Miĥajlov. Scenon el la fama romano de Ivan Turgenev „En la antaŭvespero“, tradukita de Rajna Konstantinova, plenumis la artisto de Bulgara E-Teatro Miĥail Ĉobanov kaj Tanja Rajkova — ambaŭ membroj de la Literatura Rondo. Muzike ilustris la Vesperon per sia ĉarma violono Joana Emil Strateva.

La Vespero de la Belarta E-Verkaro profunde plezurigis la ĉeestantojn (pli ol cent). Oni decidis, ke similaj vesperoj fariĝu konstanta tradicio dum la Semajno de Internacia Amikeco estonte.

K. Vălev

VESPERO DE LA AMIKECO KUN UZBEKIO EN ŜUMEN

Antaŭ nelonge bona kontakto kreiĝis inter la E-societo „Vekiĝo“ en Ŝumen kaj la esperantistoj el la Soveta Respubliko Uzbekio. La esperantistoj el Ŝumen sendis al siaj uzbekaj amikoj leterojn, rakontante pri la nova vivo en Bulgario, pri la socialisma konstruado en Ŝumen, pri la viviga bulgara-soveta amikeco. Ili esprimis deziron scii pli multe pri la antikva uzbeka lando kaj pri la nuna vivo en soveta Uzbekistano.

Rezulte de tiu ĉi peto estis ricevita pakajo enhavanta materialojn pri Uzbekio. La estraro de E-Societo „Vekiĝo“ decidis aranĝi Vesperon de la Amikeco

kun Uzbekio. La partoprenantoj ĝoje kaj kun intereso aŭskultis la salutparoladon de la uzbekaj esperantistoj kaj la priskribon de la historia urbo Samarkand, surbendigitajn. Poste estis projekciitaj lumbildoj montrantaj Samarkand, la viglan vivon en nova Uzbekistano kaj la konstruadon en la ĉefurbo Taŝkent. Je la fino estis akceptita dankletero al la Uzbeka Sekcio „Esperanto“.

Cv. Todorov

LA SEMAJNO EN STANKE DIMITROV

Estis organizita solena kunveno, antaŭ kiu parolis la vicprezidanto de E-Societo „Marek“ Eoris Miĥajlov. Post la parolado—belarta programo. Dediĉe al la Semajno la Societo aranĝis E-ekspozicion, kiu daŭris ĝis la 3-a de marto kaj vekis grandan intereson al Esperanto.

B. Drenski

V. BATIŜNICA, DISTRIKTO DE RUSE

Okaze de la Semajno de Internacia Amikeco kaj 25-a datreveno de la Socialisma Revolucio en Bulgario la Esperanto-Societo „Vilaĝa Voĉo“ aranĝis ekspozicion en la Domo de la Kulturo. Estis montritaj diversaj esperantaĵoj: lernolibroj, legolibroj, gazetoj, ĵurnaloj, broŝuroj, albumo de bulgaraj esperantistoj de 1929 j., bildkartoj, kovertoj k. a. Estis pendigitaj konvenaj sloganoj kaj aliaj propagandmaterialoj.

Dum la Semajno k-do Mitko Bajĉev tralegis bone preparitan 30-minutan raporton per la loka radio-reto. En sia raporto li parolis pri la historio de Esperanto, pri ĝia utileco kiel rimedo de internacia amikeco, paco kaj feliĉa estonto. Li rakontis ankaŭ pri la E-movado en nia vilaĝo. Fine oni aŭdigis gramofondiskojn kun Esperantaj kantoj.

D. Novakov

LA SEMAJNO ĈE „VERDA RAKETO“ EN VRACA

La solena malfermo de la Semajno ĉe la Lernanta E-Societo „Verda Raketo“ en gimnazio „Ĥristo Botev“ en Vraca okazis per parolado de la instruisto Bojĉo Mladenov. Ĉeestis 120 gelernantoj kaj 30 geinstruistoj ĉefe kun la direktoro. Gelernantoj prezentis belartan programon.

En salono de la urba Poŝtejo kune kun la loka Poŝtista E-societo „Lednika“ la lernantoj aranĝis riĉan ekspozicion de esperantaj ĵurnaloj, gazetoj, prospektoj, poŝtmarkoj je la temo „Esperanto — fenestro al la mondo“. La ekspozicio daŭris tri semajnojn kaj faris bonan impreson al la multnombraj vizitantoj.

Dufoje per la urba radio-reto gelernantoj el diversaj klasoj plenumis belartajn programojn en bulgara lingvo kaj Esperanto.

Dum la Semajno la junaj esperantistoj skribis multege da leteroj al eksterlandaj samideanoj.

*R. Pavlova,
prezidantino de „Verda Raketo“*

LA PREZIDANTO DE BEA INVITITA AL BUDAPEŬTO

La prezidanto de BEA k-do N. Aleksiev estis invitita de Hungara E-Asocio viziti la jarkunvenon de HEA, kiu okazis en la finaj tagoj de februaro. Je la nomo de la bulgara esperantistaro k-do Aleksiev faris mallongan salutparoladon antaŭ la delegitoj de la jarkunveno. Li esprimis koran dankon al niaj hungaraj amikoj pro la bona interkompreniĝo kaj kunlaborado de ambaŭ niaj asocioj. Koncize li tuŝis la agadon de BEA en la nuna jubilea jaro. Samtempe li apelaciis al la hungara esperantistaro, ĉiam aktive agadi en la vicoj de MEM, kiu ludas plej progreseman rolon en la moderna E-Movado en la nuna streĉa internacia situacio.



KUN BONAJ REMEMOROJ KAJ AMIKAJ SENTOJ AL BULGARIO

La 28—29-an de decembro 1968 en vilaĝo Obergrohlic (GDR) okazis renkontiĝo kun geesperantistoj el urbo Reichenbach. Antaŭ la kunveno s-ro Wŭrker projekciis sian kolekton de fotoj pri Bulgario. La fotoj estis faritaj dum lia estado en nia lando la pasintan someron, kiam li kune kun kelkaj samnacionoj ripozis en la Internacia E-Tendaro en vilaĝo Pavel Banja, distrikto de Stara Zagora, kaj poste vojaĝis tra la lando. Kun danko kaj simpatio al Bulgario kaj ĝia popolo parolis s-ro Wŭrker, esprimante ankaŭ la sentojn de siaj kunuloj. Je la fino de la renkontiĝo la ĉeestantoj sendis salutleteron kun ĉes subskriboj al siaj amikoj en Kazanlāk.

Ŝinka Geneva

En la 13 E-societoj en distrikto de Smoljan 125 geesperantistoj regule korespondas kun 201 esperantistoj en socialismaj kaj 307 esperantistoj en kapitalismaj landoj. Aktiveco imitinda!

**NOVA INSTRUISTA E-SOCIETO
EN VRACA**

La 14-an de aprilo 1969 j. estis fondita Instruista E-Societo „Zamenhof“ en Vraca. Fondintoj estas 14 geinstruistoj kaj lektoroj de Esperanto. Oni elektis tripersonan estraron: prezidanto Ĥristo Panĉev, sekretario — Enjo Daskalov, kultur-kleriganto — Bojĉo Mladenov.

Al la nova instruista E-societo — la dua en „ia lando post la Sofia Instruista E-societo Diĉo Petrov“ — ni bondeziras brilajn sukcesojn sur la nobla verda kampo!

SINCERA RENKONTIĜO EN SAMOKOV

La 8-an de februaro j. k. en la salono de lernejo „Samokovska Komuna“ okazis sincera renkontiĝo inter la esperantistoj de Samokov kaj la Literatura Esperanta Rendo en Sofio.

La gastoj plenumis literaturan programon ĉefe el originalaj verkoj de rondanoj. Partoprenis Asen Grigorov, Ljuba Bojaĝieva, Violin Oljanov, Tanja Rajkova, Miĥail Ĉobanov, Vesela Ivanova.

La prezidanto de BEA Nikola Aleksiev parolis pri la rolo de Esperanto por konatigo de nia lando al aliaj landoj.

Flanke de samokovaj esperantistoj estis plenumita literatura-muzika programo precipe el belegaj verkoj de la prezidanto de la loka E-Societo Vasil Trifonov. Sentoplene kantis dueton Ĥristina Veceva kaj Milka Mutafĉieva. En la programo partoprenis junaj fertoj — Anka Andonova k. a.

La koncerta pentrado de Petr Buĉavinov — a portreto de Zamenhof — estis bonsukcesa.



La partoprenintoj sofianoj

Post la programo estis regaloj, amuzoj, dancoj.

Neforgeseblaj restos por sofianoj la horoj pasigitaj inter la gastemaj samokovanoj: bona organizo de la renkontiĝo, plena salono, amika, varma atmosfero.

V. Ivanova

UTILAJ RENKONTIĜOJ

Honore al la 25-a datreveno de la Socialisma Revolucio en Bulgario en Jambol okazis dua utila E-renkontiĝo. Dum du tagoj gastis al ni 30 gejunuloj-esperantistoj el Ĉirpan.

La 22-an de februaro 1969 ĉe la fervojstacio jambolanoj gasteme renkontis siajn novajn amikojn. La posttagmezaj horoj estis enhavoriĉaj. Estis organizita komuna renkontiĝo. Ĝin malfermis Georgi Jordanov, prezidanto de DK de BEA. Post tio Dimo Trudoljubov, membro de CK de BEA kaj prezidanto de E-Societo „Maksim Gorkij“ — Jambol, parolis pri la E-Movado en la mondo, en Bulgario kaj en Jambol. D-ro Anastas Salambaŝev prelegis je temo: „Esperanto — grava faktoro por plialtigo de la lingva nivelo“. Ĵeljazko Popov el la Distrikta Historia Muzeo konatigis al la gastoj la historion de Jambol. Poste sekvis amuza programo vespere — estis kantoj, dancoj.

La sekvintan tagon la gastoj vizitis la urban ĝardenon „Vasil Kolarov“, la sportan halon „Diino Diana“, la Distriktan Historian Muzeon, la popolan parkon „Borovec“ kaj aliajn rimarkindaĵojn de Jambol.

Malfrue vespere, kiam jambolanoj adiaŭis kun siaj karaj gastoj, k-ino Nedjalka Cankova, gvidantino de la ĉirpanaj esperantistoj, dankante kortuŝite por la bonega akcepto, diris: „Ni devas daŭrigi niajn renkontiĝojn estontece. Ni atendas vin en Ĉirpan!“

K. Kavargikov

**УСТАВ НА БЪЛГАРСКИЯ
ЕСПЕРАНТСКИ СЪЮЗ**

Излезе от печат (на български и есперанто) Устав на БЕС. Цена — 25 стотинки. Всеки български есперантист трябва да притежава съюзния устав, особено членовете на окръжните комитети и на ръководствата на дружествата. Поръчки и суми изпращайте до: Български есперантски съюз, пощенска кутия 66, София.

PRINTEMPA ESPERANTO-BALO EN MADAN

La 13-an de marto ĉi-jare en la nova bela rodopa urbo Madan okazis la tradicia printempa E-junulara balo. Ĝi estis organizita de la fervora urba E-Societo „Bjalistok“. La printempa festo okazis en la granda moderna restoracio „Kristal“, kiu anticipe estis bonege ornamita per printempaj sloganoj en Esperanto, bildoj, E-flagetoj kaj aliaj. La ejo pleniĝis de esperantistoj el Madan, Smoljan, Ardino kaj aliaj lokoj de la distrikto. Venis gaste ankaŭ multaj gejunuloj-neesperantistoj, sed simpatiantoj de nia kara E-afero.

La balo estis oficiale malfermita de Mustafa Mustafov el Madan, kiu faris la salutparoladon. Sekvis salutparoladoj de Stefan Pavlov, reprezentanto de la Distrikta E-Komitato, kaj de k-do Ĝambazov — el la Urba Komitato de Komsomolo.

La programo komenciĝis per deklamaĵoj, kantoj kaj humoraĵoj en Esperanto kaj en bulgara lingvo. La grupo de Smoljan prezentis rodopajn popoldancojn kaj kantojn. La orkestro donis eblecon al ĉiu aŭskulti belan muzikon aŭ danci modernajn aŭ popolajn dancojn.

La plej ĝojiga flanko de la festo estas tiu, ke en Madan renkontiĝis multaj amikoj de la lingvo de Zamenhof. La Esperanto-medio estis sentita kaj rimarkita de la neesperantistoj, kiuj montris intereson al Esperanto.

La esperantistoj el la distriktoj de Smoljan kaj Kârĝali planis Esperanto-renkontiĝon, kiu okazos je la fino de aprilo en la belega montodomo „La blankaj betuloj“, situanta proksime de urbo Ardino.

Korajn dankojn al la laboremaj esperantistoj de Madan!

N. Bojaĝiev

PLURAJ E-KURSOJ EN STANKE DIMITROV

Ĉi-jare E-Societo „Marek“ en Stanke Dimitrov atingis bonajn sukcesojn en la disvastigo de Esperanto. Ĝi organizis la jenajn elementajn kursojn en lernejoj: en la Unua gimnazio — kun 35 gelernantoj; en la centra progimnazio — kun 13 gelernantoj; en lernejo „Evlogi Georgiev“ — kun 20 gelernantoj. La tri kursoj estas gvidataj de Vasil Gerginov, instruisto.

Krom tio estis malfermitaj du kursoj en la kultura domo „Vasil Demirevski“ — unu por komencantoj kun 8 gekursanoj, gvidata de la prezidanto de societo „Marek“, Bano Banov, kaj unu por progresintoj kun 10 personoj, gvidata de Boris Drenski.

B. Drenski

GRANDAN LETERVESPERON

organizas je la 30 de julio 1969 Sofia E-Societo „Maksim Gorkij“ okaze de la Jubilea 25-a datreveno de la Socialisma Revolucio en Bulgario. Ĉiuj, kiuj bonvolus sendi leteron, estas petataj nepre tuŝi la jenajn demandojn:

Ĉu vi vizitis Bulgarion? Kion vi scias pri ĝi? Kion vi scias pri la bulgara Esperanto-Movado? Ĉu vi havas bulgaran E-korespondanton? Rakontu pri la E-Movado en via loĝloko, lando, se eble ankaŭ pri vi mem..

Nepre vi ricevos respondon.

Adreso: Esperanto-Societo „Maksim Gorkij“, bul. Ĥristo Botev 97, Sofio, Bulgario

LA E-KURSOJ EN RAZGRAD

En la Agrikultura Teknikumo: elementa kurso kun 25 gelernantoj, gvidata de M. Deskov. Speciale diligentaj estas la kursaninoj Revasie Aĥmedova, Ŝukrie Maĥmudova, Elenka Penĉeva, Emine Ĥjuseinova, Mima Georgieva, Zebura Nuĥova k. a.

Elementaj kursoj por civitanoj: unu kun 10 gekursanoj, gvidata de P. Nedelĉev, kaj unu kun 15 gekursanoj, gvidata de Kalĉo Panov.

M. Deskov

FERVOJISTA E-RENKONTIĜO EN STARA ZAGORA

La fervojistaj E-societoj en Stara Zagora kaj Plovdiv estas en konkurado. Dum februaro plovdivanoj venis gaste al siaj „rivaloj“. Okazis utila renkontiĝo, kiu finiĝis per amika vespero en restoracio „Gorski Kât“ — Ajazmoto. Abundis gaja humoro, dancoj, kantoj. Estis aranĝitaj viktorigoj, tombolo. Oni memore faris reciprokajn donacojn.

Tiu ĉi agrabla renkontiĝo ne estas la lasta. Sekvas nova — en Plovdiv.

T.



La gastoj el Plovdiv

JUBILEA LITERATURA KONKURSO

Okaze de la 50-a datreveno de nia asocia organo „Bulgara Esperantisto“ (1919—1969) CK de BEA organizas grandan Jubilean Literaturan Konkurson. **Partopreni** povas ĉiuj bulgaraj ge-esperantistoj.

Temaro: batalo por libero kaj socia justeco, naciliberiga movado, konstruado de la nova vivo en nia Patrolando, paco kaj amikeco inter la popoloj, patriotismo kaj internaciismo, lingvo

Esperanto, vivo kaj batalo de la esperantistoj k. s.

La nombro de la verkoj, per kiuj oni povas partopreni, ne estas limigita.

Limtempo por prezentado de la verkoj: 30. X. 1969.

La rezultoj de la konkurso estos anoncitaj en „Bulgara Esperantisto“ kaj la premiitaj verkoj — publikigitaj en ĝi.

Premioj

I. Por originala versaĵo en Esperanto:

1-a premio — 30 lv.

2-a premio — 25 lv.

3-a premio — 20 lv.

II. Por originala rakonto, eseo aŭ skizo en Esperanto:

1-a premio — 30 lv.

2-a premio — 25 lv.

3-a premio — 20 lv.

La konkurso estas sekreta. La maŝin- aŭ mane skribitaj materialoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. La saman pseŭdonimon oni skribu ankaŭ sur fermita koverto, en kiun oni anticipu metu papereton kun la vera nomo de la aŭtoro kaj ties konstanta adreso. La materialojn kaj la fermitan kover-

III. Por esperantlingva traduko de versaĵo de bulgara poeto:

1-a premio — 25 lv.

2-a premio — 20 lv.

3-a premio — 15 lv.

IV. Por esperantlingva traduko de rakonto, eseo aŭ skizo de bulgara verkisto:

1-a premio — 20 lv.

2-a premio — 15 lv.

3-a premio — 10 lv.

ton oni metu en pli grandan koverton, ankaŭ subskribitan per la sama pseŭdonimo, kaj sendu ĉion rekomendite al adreso: Bulgara Esperantista Asocio, bul. Ĥristo Botev 97, Sofio (Por la konkurso).

Gekamaradoj, amase partoprenu nian Jubilean Literaturan Konkurson!

DISAŬDIGO DE RADIO SOFIA PRI ESPERANTO

Laŭ iniciato de Radio Sofia la 30-an de marto j. k. okazis 25-minuta disaŭdigo en bulgara lingvo je ĝenerala temo: „Kiel vi uzas Esperanton“. En la programo, ornamita per E-melodioj kaj kantoj, partoprenis la prezidanto de Bulgara E-Asocio Nikola Aleksiev, la gvidanto de la Lernanta E-Societo „Verda Raketo“ en urbo Vraca Bojĉo Mladenov — instruisto en gimnazio „Ĥristo Botev“, la konata veterano de la bulgara E-Movado Zora

Mladenova Hans el Varna k. a. En la programo estis donitaj ankaŭ informoj pri la agado de la bulgaraj esperantistoj por disvastigo de Esperanto kaj la perspektivoj de la E-Movado ĝenerale. Oni rakontis pri konkretaj faktoj el la praktiko de la bulgaraj esperantistoj kun atentigo pri la vasta korespondado, kiun ili gvidas por la bono de nia patrolando kaj por firmigo de la tutmonda paco kaj amikeco.

Stara Zagora. La 19. XII. 1968 okazis jarkunveno de E-societo „Fervojisto“. Notinde estas, ke k-do Karaivanov, direktoro de la Kulturdomo de Fervojistoj, kiu ĉeestis gaste la kunvenon, salutis la membrojn kaj promesis disponigi ĉambrojn por kursoj de komencantoj kaj progresintoj, ankaŭ helpon por fondo de Esperanta teatra trupo ĉe la kulturdomo.

T. Vâlev

Sofio. La 12. II. 1969 la Poŝtista E-societo „Heroldo“ havis sian jarkunvenon. La estrara raporto kaj la eldiroj montris bonajn sukcesojn: 2 kursoj por komencantoj kun 25 gekursanoj, ekskursoj, superplenumo de la plano pri abonigo al E-gazetaro k. a. Notindaj estas kelkaj novaj formoj por plialtigo de la lingva nivelo: kvaronhoro antaŭ ĉiu kunveno — lingvaj demandoj kaj respondoj, gvidata de k-do Asen Grigorov, enkonduko de konversaciaj vesperoj k. a. Grava estas ankaŭ alia agado de la sofiaj poŝtistoj: eldonado de speciala Bulteno de la Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista E-Asocio (IPTEA) — „Interligilo“ — en 600 ekzempleroj, kiu atingas 30 landojn. Ĝin redaktas Asen Grigorov.

La rezolucio de la jarkunveno antaŭvidas: pligrandigi la membraron plejparte el la medioj de junaj poŝtistoj, variigi la tagordon de la regulaj ĉiusemajnaj kunvenoj de la Societo ktp.

La Sofia Poŝtista E-Societo „Heroldo“ strebas okupi ĉiam unu el la unuaj lokoj inter la E-societoj en nia lando.

V. Ivanova

ATENTON, VIZITANTOJ DE LEIPZIG!

Ni ricevis el GDR leteron de E-terano Erich Löwe el Leipzig, kie li interalie skribas:

„... Mia bofratino kaj mi estas ekzamenitaj urbogvidistoj. Por popularigi la aferon necesas, ke multaj eksterlandanoj postulu Esperanto-gvidistojn de „Presse — und Kongresstelle“, 701 Leipzig. Ankaŭ de Dimitrov-Muzeo. Tie ĉiutage deĵoras k-do Bässler, sed neniu esperantisto ĝis nun petis klariĝojn en Esperanto. Amase venas bulgaroj ĉi tien. Helpu laŭpove forigi la nunan staton...“

II-AJ INTERNACIAJ ESPERANTO- KURSOJ EN RODOPI-MONTARO

Ĉarma Rodopa naturo kun riĉaj koniferaj arbaroj, neforgeseblaj pitoreskaj panoramoj, unuagrada montodomo „Studentec“ en Pamporovo kaj modela Studenta Domo en Smoljan kun po du-trilitaj ĉambretoj, elstaraj lektoroj, sincera amika etoso.

20-taga grupoj

KOMENCANTOJ — 7. VII — 26. VII.

a) Unua grupo — en montodomo „Studentec“, lektoro Georgi Dimov, docento en Supera Ekonomia Instituto, Varna.

b) Dua grupo — en la Studenta Domo, lektoro Jordan Angelov, instruisto el Plovdiv.

PROGRESINTOJ — 28. VII — 16. VIII

a) Unua grupo — en montodomo „Studentec“, lektoro Kunĉo Vâlev, instruanto de Esperanto en la Sofia Universitato „Kl. Oĥridski“.

b) Dua grupo — en la Studenta Domo, lektoro — instruisto el Francio.

**SUPERA GRUPO (PREPARO DE
E-INSTRUISTOJ) — 18. VIII — 6. IX**

Nur unu grupo — en montodomo „Studentec“, lektoro Ana Hurĉak el Jugoslavio.

Ĉiu grupo ĉiutage po 5 lernohoroj, entute — 80 lernohoroj. Post la lecionoj — kantoj, amuzadoj, promenadoj en la belega ĉirkaŭaĵo. Dum liberaj tagoj — ekskursoj al pitoreskaj lokoj. Ĉiu povus diplomiĝi post sukcesa ekzameno antaŭ speciala komisiono.

Detalajn informojn petu de: Distrikta Komitato de Bulgara Esperantista Asocio, Smoljan, Bulgario.

Venu pasigi neforgeseblajn tagojn en la ĉarma bulgara Sudo; en la montoj de la legenda Orfeo! Venu ripozi! Venu lerni kaj perfektigi en Esperanto!
Distrikta Komitato de BEA — Smoljan

HEROA PASINTECO

ANGEL MINKOV ĈOPEV

Tiu heroa filo de Rodopimontaro estas naskita en 1910 j. en la tiama vilaĝo Ĉepino, nun kvartalo de urbo Velingrad. Jam infano, Angel sentis la amaron de la mizero. Tial li finis nur la unuagradan lernejon kaj komencis labori en fabriko por seĝoj. Jam li devis gajni vivrimedojn por sia malriĉa familio.

En la fabriko Angel tre rapide komprenis la ĉefan kaŭzon de la sociaj maljustoj, kiuj ekzistis en la burĝa socio. Unuflanke — laboristoj kun tute malgrandaj salajroj kaj longedaŭra laborago, malgraŭ ke ili produktas la materiajn valorojn. Aliflanke — riĉuloj, kiuj amasigas grandegajn gajnojn el la forrabita laboro de la laboristoj. Angel komprenis, ke li devas batali kontraŭ tiuj maljustaĵoj, sed ne unuope. Al la socia subpremo kaj ekspluatado estis necese kontraŭstarigi organizitan forton. Tia povis esti nur la forto de la laborista klaso. Pro tio Angel estis inter la unuaj, kiuj iniciatis fondon de laborista organizaĵo en la fabriko. Kaj li manifestigis neŝancelebla, firma kaj kuraĝa gvidanto de la strikoj, organizitaj de la Laborista Partio. Impeta kaj sentima laŭ karaktero, li estis ĉiam simpatia al la laboristoj, preta oferi sian vivon, defendante la vivnecesajn interesojn de la laborista klaso.

Por kompensi la mankojn de sia nesufiĉa instruiteco, Angel komencis

lerni sola, aŭtodidakte. Ĝis malfruaj horoj nokte li legis, trastudis politikan kaj alian literaturon. Kun granda ĝojo, kaj tre rapide li, ordinara laboristo, ellernis ankaŭ la Internacian Lingvon Esperanto. Ĉio ĉi helpis lin satigi sian soifon al scienco kaj kulturo, krei sian progreseman mondkoncepton.

Pere de Esperanto Ĉopev kontentigis siajn vastajn interesojn pri la stato kaj la bataloj de la laborista klaso kaj pri la politikaj eventoj en la tuta mondo. En specialaj okazoj li uzis eĉ sekretan inkon, skribante inter la linioj de siaj korespondaĵoj kun politikaj malliberuloj. Nenian fidon li havis al la korupta burĝa gazetaro. Per Esperanto Ĉopev trovis novajn amikojn en nia lando kaj en eksterlando. Lia horizonto plivastigis, lia entuziasmo en la batalo kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo kreskis.

Bedaŭrinde, nun lia biblioteko el Esperanta, politika kaj alia literaturo



ne plu ekzistas. Ĝi kaj la E-korespon-
daĵo de Ĉopev estis konfiskitaj de la
polico, kiu vidis en li „danĝeran ho-
mon“. Konservigis hazarde nur kelkaj
esperantaĵoj: unu verda insigno kaj la
libroj „Bulgaraj rakontoj“ de Ivan
Vazov, „La verda koro“ de Julio Baghi
kaj „La Esperanta-bulgara vortaro“ de
Asen Grigorov, eldono de Laborista
Esperanto-Unuigo en nia lando.

Angel Ĉopev estis sagaca kaj tre
kapabla teknikisto. En sia subtera te-
nejo li muntis maŝinon kaj komencis
stampi arĝentan monon, per kiu li
helpis la kontraŭfaŝisman batalon. Sed
tio ne povis daŭri longe — li estis de-
nuncita, arestita kaj ĵetita en malli-
berejon.

Ĉirkaŭ la momento, kiam faŝisma
Germanio invadis Sovetunion, Copev
eliris el la malliberejo. La kontraŭ-
faŝisma batalo disvolvigis kun nova
impeto. Multaj progresemaĵoj homoj
estis persekutataj, arestataj, ĵetataj en
malliberejojn. En 1942 j. Ĉopev estis
elektita kiel membro de la Distrikta
Komitato de Bulgara Komunista Partio
kaj respondeculo pri la sekretaj bata-
grupoj. Al li kaj Atanas Zisov la Dis-
trikta Komitato komisiis trovi konve-
nan lokon en la montaro kaj konstrui
terkabanon por la unuaj partizanoj.
Senprokraste la terkabano estis preta:
bone ekipita, kun forno, radio k. a.
En ĝi trovis sian rifuĝejon la parti-
zanoj Nikola Bojanov, Koĉo Gjaurov
kaj Atanas Semergiev.

En la komenco de 1943 j. la parti-
zanoj de Ĉepino malsupreniris la vila-
ĝojn por ĵurigi junajn komunistojn.
Tiutempe Ĉopev preskaŭ ne revenis

hejmen, ne ripozis. Novajn homojn oni
devis altiri en la ekzistantajn batal-
grupojn, formi novajn grupojn. La kon-
traŭfaŝisma batalo akriĝis pli kaj pli.
Ĝuste en tiu momento la fabriko de
fratoj Palankov en Velingrad komencis
ellabori lignodometojn por la germana
armeo sur la Orienta Fronto. La kon-
traŭfaŝistoj tion ne povis toleri.

Je la fino de marto 1943 j. la Dis-
trikta Komitato de BKP decidis, ke la
fabriko estu bruligita. Ĉopev aktive
partoprenis en la preparo de la dan-
ĝera operacio. La 4-an de aprilo la
fabriko estis bruligita. Tuj sekvis ondo
de arestoj al komunistoj. La 15-an de
aprilo ankaŭ Ĉopev estis arestita. Kon-
traŭ li, Vinĉo Goranov kaj Vl. Kacarov
estis aplikitaj la plej kruelaj inkvizi-
cioj, kiujn povas elpensi la kontraŭ-
popola polico: tagnoktaj batadoj, rom-
pado de brakoj, kruroj, ripoj. Tiu ĉi
torturo daŭris du semajnojn. En sen-
konscio, kun rompita piedo kaj elti-
ritaj ungoj, duonmorta, Angel Ĉopev
kun Vinĉo Goranov estis veturigataj
per ŝarĝaŭtomobilo al la loko Delo-
vete en la suda periferio de Ĉepino.
Ektondris salvo kaj venis la fino de
ambaŭ herooj.

En momento, kiam la naturo, liberi-
ĝinta de la vintraj katenoj, vekigis
por nova, riĉa vivo, kiam ĉio gajis kaj
prikantis junecon kaj belecon, ĉesis
bati du koroj, revantaj nur pri prin-
tempo de la vivo, pri feliĉo de ĉiuj
homoj. Unu el ili — la koro de Angel
Ĉopev — fidela filo de la bulgara po-
polo, brava soldato de la Komunista
Partio kaj arda esperantisto.

Manol Ĉolev

Gekamaradoj,

*abonoj al „Bulgara Esperantisto“ ankoraŭ eblas — ĉu por tuta, ĉu por
duonjaro. Abonu nian asocian organon! Abonigu viajn amikojn, konatojn!*



KRESKAS LA DELEGITA RETO DE UEA

Same kiel tiu de la telefona reto, la utileco de la konata delegita reto de UEA dependas de ĝia vasteco. Ĵus farita statistiko montras, ke la nombro de lokaj delegitoj kreskis en 1968 de 1343 ĝis 1408, dum tiu de fak-delegitoj kreskis de 1802 ĝis 1887. Entute la nombro de delegitaj oficoj plenigitaj kreskis de 3472 ĝis 3597.

La delegita reto de UEA ampleksas nuntempe 63 landojn kaj estas je la dispoŝo de ĉiuj membroj de UEA. La lokaj delegitoj respondas al informpetoj pri, ekzemple, komerco kaj industrio, trafiko, laboro, dungo kaj salajroj, turismo, instruado ktp. Fakdelegitoj okupiĝas ekskluzive pri demandoj rilatantaj al la koncerna fako. La plej gravaj fakoj estas nuntempe: edukado, fervojoj, industrio, junularo, juro, komerco, turismo, la speciala SOS — aŭto-servo. La tuta delegita servo estas senpaga.

Informa servo de UEA № 6/1969

GRAVA ANONCO

La 3 danaj ministroj pri kulturo, instruado kaj eksterlandaj aferoj devas ricevi fortan impreson pri la uzado de Esperanto. Tial ni petas alsendon de 3 ekz. de ĉiuspecaj broŝuroj, klubaj informiloj, revuoj, libroj ktp. Post la transdono ĉiu kontribuinto ricevos raporton. Adreso: Inĝeniero Ib. Schleicher, Ved Bellahoj 21. 13. DK-2700 Kopenhago BRH, Danlando.

NOVAĴOJ EL ESTONIO

En Estonio en februaro estas kreita Esperanto-Komisiono ĉe la Estona Societo por Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando. La Komisionon gvidas malnova esperantistino, redaktoro de estona ŝtata eldonejo, k-dino E. Kuusküll. Ankaŭ la aliaj kvar membroj estas spertaj esperantistoj. La Komisiono organizas la rilatojn de estonaj esperantistoj kun eksterlando, konatigas estonan literaturon kaj akiraĵojn al aliaj landoj per Esperanto ktp.

En 1970 aperos en Tallin granda Esperanto-estona vortaro en ŝtata eldonejo „Valgus“. La vortaron kompilis R. Haabvere, redaktos akad. prof. P. Ariste kaj aliaj spertuloj. La eldonejo planis eldonkvanton de 30 000 ekz.

Johannes Palu

HELPU AL BRAZILAJ ESPERANTISTOJ!

Dank' al multaj esperantistoj el la tuta mondo, en Fortaleza ni havas Esperanto-kurson en la Federacia Universitato de Ceara. Tio okazis, ĉar ni pruvis per granda nombro da poŝtkartoj kaj leteroj, ricevitaĵ de la Rektoro, ke estas esperantistoj en la tuta mondo.

Ankaŭ ni montris al ĉiuj, ke nia literaturo estas riĉa, dank' al 1134 libroj, senditaĵ al nia biblioteko de 120 gesamideanoj.

Nun . . . **Dependas de Vi** la enkonduko de nia kara lingvo en la plej gravan lernejon de nia urbo. Oni faris leĝon, inklurivante Esperanton inter la lernobjektoj de la Urba Lernejo, kie oni instruas pli ol 3000 ĝelernantojn. Sed la leĝo ne devigas la instruadon, ĝi estas laŭ la volo de la direktoro.

Tie oni instruas en ĉi tiu jaro Esperanton nur en unu klaso, prove, kaj se la rezulto estos kontentiga, la direktoro adoptos la lingvon en aliaj klasoj en 1969.

Do ni petas vin sendu poŝtkartojn al:

Prof. Edmilson Pinheiro, Direktoro de Colegio Municipal „Filgueiras Lima“, Fortaleza — Ceara — Brazilo,

gratulante lin pro la enkonduko de Esperanto. Se vi povas, sendu ankaŭ esperantan literaturon por la biblioteko.

Dankas al vi Paulo Amorim Cardoso, Delegito de UEA kaj Direktoro de Esperanto-kurso en Federacia Universitato de Ceara, kies adreso estas: **Poŝtkesto 1221 — Fortaleza — Ceara — Brazilo.**

Universala Kongreso de Esperanto okazos ĉi-jare en Nordo, en Finnlando. Pasintece UK de Esperanto okazis en la ĉefurbo Helsinko en 1922. Ĉi tie mi prezentas al la legantoj de „Bulgara Esperantisto“ mian patrolandon.

LA LANDO MEM

La lando havas 4 700 000 loĝantojn. Tamen ĝia areo estas granda — 337 009 km², kio signifas, ke laŭ surfaco Finnlando estas je la kvina loko en Eŭropo.

Vastaj arbaroj (precipe de pinoj, abioj kaj betuloj) kovras plej multan parton de la lando. La nombro de la lagoj estas 62 000, el kiuj plej granda estas Saimaa (4400 km²).

Granda insularo — 6500 insuletoj — etendiĝas en la sudokcidenta parto de la lando, kie ankaŭ situas la plej granda insulo Aland kiel ponto inter Finnlando kaj Svedio. Tie estas 8000 loĝantoj, preskaŭ nur svedlingvaj. La insulo estas aŭtonoma parto de Finnlando. Turistoj, kiuj alvenas Finnlandon tra Svedio kaj per ŝipo al urbo Turku, havas riĉajn rememorojn, travojaĝante la tutan insularon. Eĉ ni, finnoj kaj nordlandanoj, ricevas neforgeseblajn impresojn.

LA HISTORIO

En sia miljara historio Finnlando estis subigita al Svedio kaj poste al cara Ruslando. La sveda lingvo estis longe la sola oficiala lingvo de la lando. Post la Oktobra Revolucio kaj fondiĝo de soveta regpotenco la lando ricevis sian sendependecon el la manoj de la estro de l' Soveta Registaro Vladimir Iliĉ Lenin. Oni fondis Finnlandan Respublikon.

La nuna prezidanto, d-ro Urho Kallevi Kekkonen, estas jam trian fojon reelektita. En la parlamento estas

200 deputitoj, elektitaj de 8 partioj, el kiuj la duono estas grandaj kaj la ceteraj — malgrandaj. En la nuna registaro estas reprezentitaj tri grandaj partioj: „Meza partio“, kiu reprezentas plejparte kamparan terposedantaron, socialdemokrata kaj popoldemokrata-komunista, kaj krome du malgrandaj partigrupoj. En la parlamento la registaron subtenas ĉirkaŭ 150 deputitoj.

LA KULTURO

Hodiaŭ Finnlando estas oficiale du-lingva. La ŝtataj oficistoj devas uzi finnan kaj svedan lingvojn. En la urboj apud la marbordo (Helsinko, Turku, Porvoo k.a.) en vendejoj, trafikiloj ktp oni konas svedan lingvon. La urboj estas ĝenerale unulingvaj.

La Universitatoj estas 7 kaj unu de ili, en Turku, entute svedlingva. Finna lingvo estas tute fremda al ĉiuj eŭropaj lingvoj, nur estonoj kaj finnoj povas iom interparoli komprenante unu la alian per siaj nacilingvoj. La legopovo estas 100-procenta. La deviga lernado de ĉiuj infanoj estas jam centjara.

LA URBOJ

La ĉefurbo *Helsinki* havas 530 000 loĝantojn. La maro preskaŭ ĉirkaŭas ĝin. Tiea universitato estas la plej granda en nordaj landoj. Ekde 1967 jaro tie oni instruas libervole Esperanton.

UK de Esperanto okazos en teknika altlernejo, apud la urbo, 8 km de la centro. Plej granda parto de kongresanoj trovos tie ankaŭ loĝejojn.

Tampere en la meza parto de la lando estas la dua laŭ grandeco. Ofte oni nomas ĝin „Finnlanda Manchester“, ĉar tie estas multe da fabrikoj.

La kultura vivo, precipe teatroarta kaj literatura, estas tre vigla. La urba somera teatro estas ŝatata en la tuta lando.



Turku estas la tria laŭ grandeco kun 150 000 loĝantoj. Ĝi estas plej malnova, historia urbo. De ĝia haveno trairas tre vigla ŝiptrafiko al la svedaj havenoj. La industrio kaj la komerco en *Turku* estas tre viglaj.

Postkongreso de Helsinkia UK okazos en *Turku* la 2—6-an de aŭgusto. En la programo estas antaŭviditaj plejparte ekskursoj en la ĉirkaŭaĵoj, inter la bela proksima insularo. En la urbo estas la plej multmembra E-klubo de la lando.

LA EKSURSOJ

Laŭkutimaj tuttagaj kongresaj ekskursoj direktigos al kelkaj malgrandaj pitoreskaj urbetoj. Tie oni povus konatiĝi kun la finna kampara vivo kaj la belaj apudaj lagoj. Oni vidos interesajn apudlagajn arbarojn, vilaĝetojn, dekojn da boatoj, strandojn kaj domojn, kie loĝantoj el la proksimaj urboj ferias en la someraj monatoj.

ESPERANTO-MOVADO

Kvankam la finna Esperanto-Movado estas multjara, ĝi neniam estis tiom larĝa kaj forta kiel en multaj eŭropaj landoj. Preskaŭ neniam ĉi tie samtempe funkciis pli ol 20—25 E-kluboj. Dum la lastaj jardekoj la Movado preskaŭ stagnis. Mankis kapablaj organizantoj inter la malgranda esperantistaro. En la lastaj 2—3 jaroj la Movado tamen videble vigliĝis. Pro tio la tutlanda E-kunveno kuraĝis inviti UK en la landon. Finnoj kredas, ke ilia UK sukcesos. Oni devas tamen memori, ke la esperantaj fortoj en la lando nun estas malgrandaj.

Ĉiuokaze: bonvenon en Finnlandon en julio 1969!

Niilo Kavenius

I-A TUTPOLA KURSO POR GVIDANTOJ DE SKOLTTRUPOJ „AMIKECO“

Dum la tagoj 24. II — 3. III. 1969 okazis en Perloz, vojevodio de Olŝtin, kurso por gvidantoj de skolttrupoj „Amikeco“. La kurson oni aranĝis iniciate de Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Junularo (PEJ) kaj Vojevodio Komandantaro de Pola Skolta Asocio (PSA) en Bidgoŝĉ. En la kurso partoprenis 60 personoj, el kiuj 40 estis membroj de PEJ, kiuj ankaŭ agas en Pola Skolta Asocio. Komandanto de la kurso estis skolta majstro mag. Andĵej Gjenbovski — prezidanto de PEJ, vicprezidanto de TEJO kaj ankaŭ konata aktivulo de PSA.

La partoprenintoj en la kurso loĝis en plej bela kaj plej moderna skoltinstruejo de PSA en Pollando.

La vojaĝkostojn plene financis Ĉefa Komandantaro de PSA. La celo de la kurso estis:

ellabori ĝustajn por skolttrupoj „Amikeco“ formojn kaj metodojn de agado.

Al la plej imponaj aranĝoj en la socipolitika temaro de la kurso apartenis la diskutado pri „La aktualaj problemoj de ideologia batalo en la lumo de la decidoj de V-a Kunveno de Pola Unuiĝinta Laborista Partio“. Bonsukcesaj aranĝoj estis ankaŭ: „Prijuĝo de imperiismo“, scienca sesio „Kopernik — granda polo kaj sciencisto“ kaj „Konferenco de junularaj vojaĝoficejoj“.

La esperantistoj estis la plej aktivaj kaj ĝuste ili bonege gvidis ĉiujn aranĝojn. La partoprenantoj de la kurso aŭdis interesan prelegon de Roman Dobĵinski — „Orienta politiko de Germanio“ — kaj impresojn de Marius Dastih pri la batalo de la vjetnama popolo. M. Dastih ankaŭ sonbendis por Pola Radio

ELPAROLO (PRONONCADO)

Por la bulgaroj ĝenerale la Esperantaj fonemoj¹ ne estas objekto de speciala kaj detala lernado; la alfabeto ordinare okupas eĉ ne plenan lecionon ĉe la instruado. Nature, ni povas supozi, ke en la prononcado de iuj fonemoj fare de lernantoj aŭ de novaj, nespertaj esperantistoj, eraroj aŭ devioj ne estas ekskluzivataj, sed ni ĉiam esperas, ke dum la lernado la instruanto rimarkos tiajn deviojn kaj siatempe atentigos kaj korektos la lernantojn.

Ni devas scii, tamen, ke fonemoj, unuavide tre simplaj kaj klaraj, ne estas egale elparolataj de ĉiuj nacioj. Iuj fonemoj estas elparolataj kun diversaj nuancoj (ekzemple en la franca lingvo *e*: *e*, *é*, *è*, *ê*), kiuj por alilingvanoj ne estas ĉiam facile alproprigeblaj.

En „Българска фонетика“ de prof. St. Stojkov ni legas, ekz., ke la bulg. *a* sonas same kiel en la ceteraj slavaj lingvoj, sed diferencas de *a* en la franclingvaj vortoj *madame*, *base*; *e*

POR BONA UZADO DE LA INTERNACIA LINGVO

bulg. sonas kiel la serbokroata *e*, sed estas pli malfermita ol la rusa *e*, pli fermita ol la ĉeĥa *e*, diferenca de *e* en la francaj *été*, *mettre*, en la germanaj *Meer* kaj *jetzt*, en la italaj *nero*, *reo* ktp.

Por pli granda klareco de la demando ne estus superflujaj kelkaj elementaj scioj el la sfero de la fonetiko. La fonemoj produktigas lige kun la aranĝo de la homa parolaparato: la buŝa kavo kaj la enestantaj organoj — lango, dentoj, palato, velo, gorgo, pli ĝuste — de iliaj movoj kaj ilia pozicio ĉe la trapaso de la elspira aera fluo. Tiu ĉi aparato ne prezentas ideale precizan mekanikan instrumenton, kies funkciado estus libera de la psika stato de l' uzanto. Malgranda plilarĝigeto de la buŝkavo, nerimarkebla alimoveto de la lango ktp. aldonas al la produktata sono suplementan „koloron“. Neniam la homa buŝo povus ripeti kiun ajn sonon centprocente same kiel la produktitan antaŭe. Sed aliparte la diferencoj ordinare ne estas rimarkeblaj de la aŭskultanto: ja ankaŭ la homa aŭd-

¹ *Fonemo* — lingvoscieca termino, kiu esprimas la nocion *sono*, produktata de la homaj parologranoj kaj prezentanta elementon de la lingvo.

fragmentojn de la plej interesaj aranĝoj.

La skolttrupoj „Amikeco“ agas utiligante fremdajn lingvojn, inkluzive Esperanton. Dum la kurso Esperanto vekis grandan intereson, tial oni gvidis mini-kurson de la Internacia Lingvo. En Perkoz kunsidis ankaŭ la Ekzekutiva Komitato de la Ĉefa Estraro de PEJ, kiu pridiskutis la plej aktualajn problemojn de PEJ. Ĝi tre alte pritaksis la atingojn de la kurso. Oni konkludis, ke la kunlaboron inter PEJ kaj PSA oni devas agnoski kiel tre utilan por la disvolvo de la junulara E-Movado en Pollando. Tre pozitive pritaksis la kurson ankaŭ reprezentantoj de Ĉefa Komandantaro de PSA, proponante al PEJ daŭrigon de la kunlaboro. Laŭ ilia opinio la membroj de PEJ povas esti bonegaj skoltgvidantoj en la dumlion-membra Pola Skolta Asocio.

Kristina Slomkovska

EGAMI — PREZIDANTO DE JAPANA SCIENCA KONSILANTARO

Komitatano de UEA prof. Fujio Egami estas la nova prezidanto de Japana Scienca Konsilantaro — la plej grava scienca organizaĵo de Japanio post la Japana Akademio. Ĝi estas ŝtata instanco kaj reprezentas ĉiujn japanajn sciencistojn.

Prof. Egami, naskita en Tokio en 1910, estas profesoro pri biokemio en la Universitato de Tokio, membro de la Konsilantaro de la Internacia Unuiĝo de Biokemio. Li estas ankaŭ prezidanto de Japana Esperanto-Instituto.

aparato ne estas ideale preciza maŝino kaj krome ĝi ofte perceptas ne ĝuste la sonon, kiun la parolanto elformis, sed tiun, kiun li atendas aŭdi. La diferencoj estas fikseblaj nur maŝine — per specialaj aparatoj.

Ekde beba aĝo, kiam la homo komencas balbuti la unuajn vortojn, li adaptas siajn parolorganojn imite al la prononcado de la ĉirkaŭa medio kaj tiel kreigas kaj stabiligas lia prononcmannero por la tuta vivo; la kutimo fariĝas „dua naturo“. Tiel formiĝas la specifaj naciaj artikigaj manieroj, diferencaj ĉe la diversaj popoloj. Sed tio ne konsistigas nevenkeblan obstaklon por alinaciaj personoj, lernantaj fremdan lingvon.¹ Rilate al Esperanto: ne estas obstaklo por interkomprenado, nek ia domaĝo, se franco kaj bulgaro elparolus kun diferencaj nuancoj ekz. la fonemon *e*.

Por iuj interlingvistoj stariĝas demando pri enlasebleco (aŭ enlasindeco) de la necesa fonemaro en internacia lingvo konsidere al facila prononcado por ĉiuj nacioj. La kreinto de Volapük intence eliminis el sia tutmonda lingvo la fonemon *r*, ĉar ĉinoj ne povas ĝin prononci. Sed ja tio estus problemo por la ĉinoj ĉe lernado de ĉiu ajn fremda lingvo, posedanta tiun ĉi fonemon (la angla, la franca, la rusa ktp.); fakte la ĉinoj trovas manieron esprimi la fremdan por ili fonemon *r* — probable per la proksima laŭ sonado velaro *g* aŭ per iu simila fonemo. Ja ankaŭ infanetoj en frua aĝo ne povas artikigi *r*, sed elparolas *l*, tamen la aŭskultantoj komprenas, kion „dezi-las dili“ la infaneto. Nu, ĉiu komprenos ankaŭ ĉinon, kiam li „pagolas integnacian lingvon“.

La konata rusa lingvisto N. S. Trubeckoj okupis sin siatempe pri la problemo de internacia lingvo kaj pri la fonema konsisto trovis, ke tia lingvo devus posedi ne pli ol 14 fonemojn (5 vokaloj: *a, e, i, o, u*, 9 konsonantoj: *p, t, k, m, n, s, l, y=j, w=ŭ*). Tia ekstrema simpligo certe ne rezultigus taŭgan rimedon por internaciaj komunikoj.

Ni ne devus preteratenti, cetere, ke ĉiu homo de kiu ajn nacio povus — ĉu per pli aŭ per malpli grandaj penoj — sukcesi artikigi la malfacilajn sonojn de fremda lingvo, ĉar en lia buŝo ja ne mankas la necesaj parolorganoj, kiuj simple ne akiris kutimon por necesaj movoj kaj pozicioj.

Parolante pri *r*, mi menciis, ke la franca *r* kaj la bulgara *r* estas de *malsamaj fonemoj*: la franca estas *velaro* (artikigata ĉe la velo), la bulgara — *dentalo* (la langopinto tuŝas la dentojn). Sed la malsama elparolo de *r* neniel ĝenas la interkompreniĝon de bulgaraj kaj francaj esperantistoj. Aliparte, ni scias, ke estas bulgaroj, kiuj pro specialaj fiziologiaj kaŭzoj ne povas adaptigi siajn parolorganojn por artikigo de iuj fonemoj en la propra nacia lingvo kaj elparolas iujn proksime sonantajn fonemojn, ekz. estas bulgaroj, kiuj ne povas prononci la bulgaran dentalan *r*, sed prononcas en sia bulgara parolo la francan *r*.

Jam en la 1-a Universala Kongreso (Bulonjo ĉe Maro, 1905) okazis diskutoj pri ĝusta prononcado de kelkaj Esperantaj fonemoj (*e, o, a, ĥ, d, n, r, j, ŭ*) kaj Zamenhof mem donis valorajn klarigojn.

Fine mi devas atentigi, ke iuj fonemoj ofte ricevas specialan nuancon de prononco depende de apudeco kun aliaj fonemoj. Ekz., por prononci *n* ni devas tuŝi la dentojn per la langopinto (na, ne, no ktp.), sed ĉe elparolo de *ng, nk* (lango, longa, lingvo, ankro ktp.) la lango ne atingas la dentojn kaj riceviĝas neevitebla „nazaligo“ de la antaŭstarantaj vokaloj; se vi penos nepre en tiaj okazoj artikigi *n*, tuŝante la dentojn per la lango, inter la du konsonantoj *n* kaj *g* (resp. *k*) necese okazos halteto kaj eĉ aperas ia malforta rapida intersono simila al la bulgara ъ.

Havante en konsidero la suprajn ĝeneralajn notojn, ni nun povas fari trarigardon de la Esperantaj fonemoj, en kiuj estas rimarkataj devioj en la parolado de bulgaraj esperantistoj.

¹ Tre interesajn informojn pri tiu ĉi demando oni povas trovi en la prelego de prof. d-ro St. Ĝuĝev „La muziko de la lingvo“, farita en la Somera Universitato de la 48-a UK (Sofio, 1963), kaj speciale en la parto, traktanta la *aŭdozonojn* kaj la *temperadon* de la sonoj.

Rim. de la Redakcio. La menciita prelego de prof. Ĝuĝev estas publikigita nenie ĝis nun. En la sekvantaj numeroj de nia gazeto ni donos eltiraĵojn el ĝi — speciale la parton, kiu havas ligon kun la jena artikolo.

Komencantoj kaj ofte ankaŭ nespartaj novaj esperantistoj malatentas la diferencon inter la vokalo *i* kaj la konsonanto *j*. Oni devas bone kompreni kaj memori la diferencon inter *ia*, *io*, *iu* ktp., unuparte, kaj *ja*, *jo*, *ju* ktp. aliparte, senti en *i-a* du silabojn kaj en *ja* unu silabon. Mi havis okazon aŭdi el la buŝo de klera esperantistino (cetere konstruanta sian parolon sen gramatikaj eraroj) elparoli *jom* *vost jom* anst. *iom* *post iom*.

La samon ni povas diri ankaŭ pri *u — ŭ*. Iuj erare elparolas, ekz., *mi bedaŭras* (4 silaboj: be-da-u-ras) anst. *bedaŭras* (3 silaboj: be-daŭ-ras), krome: *morgau* (mor-ga-u) anst. *morgaŭ* (morgaŭ), *daŭras* anst. *daiŭras* k. s.

Vokalredukcio

Tiu ĉi fenomeno, karaktera por la orient-bulgaraj dialektoj, transkondukigas en Esperanton precipe de neatenemaj esperantistoj el la dirita regiono: neakcentata *o* estas elparolata ofte *u*, *e — i*, *a — ŭ*: *Ispirantu ikzistŭs*. El la buŝo de bonaj kaj kleraj esperantistoj tia eraro ne estas rimarkata.

e — je

Ĉe esperantisto el la samaj orient-bulgaraj regionoj tre ofte *e* aŭdiĝas moligita (je): *jestas* anst. *estas*. Por forigi tiun ĉi neagraban elparolon oni devas eviti altigon de la meza parto de la lango al la palato, sed lasi la langon en kvietata stato (alivorte: la orientbulgaraj esperantistoj imitu la elparolon de la okcidentbulgaroj).

jes, jen — es, en

Ankaŭ tiu ĉi eraro ne estas malofta kaj — kio estas interesa — ĝuste ĉe esperantistoj de la supredirita regiono, kiuj aliparte aldonas *j* al *e*.

Tiu ĉi fonemo en la buŝoj de preskaŭ ĉiuj bulgaraj esperantistoj sonas malmole (kio cetere estas karakteriza por ĉiuj balkanlandaj popoloj, inkluzive la rumanojn) kaj tio impresas alilandajn samideanojn, kiuj perceptas nian *l*, kiel *u* (*ŭ*). Dum la UK en Budapeŝto (1966) pola esperantistino turnas sin al bulgara samideano: „Vi certe estas bulgaro?“ — „De kio vi komprenis tion?“ „Vi elparolas *aŭ* anstataŭ *al*.“

La demando pri prononcado de tiu ĉi fonemo estis traktata en la 1-a UK (1905) kaj Zamenhof donis jenan klarigon: „*l* devas esti elparolata plej klare, nek tro mole, nek tro malmole, sed en meza maniero“ (laŭ la Raporto pri la 1-a UK). Fakte por bulgara buŝo tia elparolo ne estas malfacila — oni devas iom larĝigi la mezan parton de la lango (kaj ĉe tiu movo la lango-pinto iom retiriĝas malantaŭen), sed la enradikiĝinta kutimo plej ofte superas la konscian artikigon. Restas konsolo, ke tamen, eĉ ĉe tia elparolo de *l* la interkompreno ne suferas.

h — ĥ

Tio estas du malsamaj fonemoj. Multaj bulgaraj esperantistoj posedas kaj uzas la Rusa-Esperantan Vortaron de Bokarev (Moskvo, 1966), sed mi ne scias, ĉu kaj kiom de ili legis kaj priatentis la tabelon sur pĝ. 532 (Aldono), en kiu estas donitaj la literoj de la esperanta alfabeto kaj iliaj adekvataĵoj en la rusa alfabeto. Kontraŭ *ĥ* ni vidas la rusan *x* (kia estas ankaŭ la bulgara), sed kontraŭ *h* — neniu rusa litero. Do, por tiu ĉi fonemo en la rusa lingvo ne ekzistas signo; tio rilatas ja ankaŭ la bulgaran lingvon¹. Ĉu tamen en la rusa ĝi absolute malekzistas? En klarigoj al la menciita tabelo estas indikite, ke *h* estas pronon-

¹ La demando pri la fonemo *h*, ĝia origino, penetra en diversajn lingvojn, vastiĝo, prononcuoj kaj malapero en iuj lingvoj, estas interesa kaj merita pli vastan kaj detalan studon, sed tio ne estas objekto de la jena artikolo.

cata kiel la germana *h* aŭ la ukraina *z*, kaj ke tiu ĉi fonemo estas aŭdebla en la rusaj interjekcioj „ara“, „oro“¹. Tion ni ne povas diri pri la bulgara lingvo: en ĝi efektive ne ekzistas tia fonemo. Dum *ĥ* estas *velara* fonemo, laŭ artikigloko proksima al *g* kaj *k*, *h* estas *laringa* fonemo kaj estas artiki-gata pli profunde en la gorgo ol ili; ĝi sonas kiel alspiro al vokalo: (*h*)*a*, (*h*)*o* ktp. En la lernolibroj de Esperanto por bulgaroj ordinare estas donataj sekvaj eksplikoj: *h* — *х слабо*, *ĥ* — *х сильно* (iuforte atingante ĝis *kh*, sed ĝuste tian trefortigitan elparolon Zamenhof ne rekomendas). Fakte, en la evoluo de Esperanto aperis tendenco uzi *k* anstataŭ *ĥ* preskaŭ ĉie (kaj precipe en fonemgrupo *rh*: *arkitekto*, *arkivo* ktp., kiel ni havas origine fundamentan: *krestomatio*). Nur en la vortoj *ĥolero* kaj *ĥoro* tia anstataŭigo ne estas ebla, ĉar *kolero* kaj *koro* havas jam aliajn signifojn (sed kelkaj jam preferas uzi *koruso* anstataŭ *ĥoro*). Ĝenerale la esperantistoj en pli multaj landoj elparolas *h* velare (kiel *ĥ*), dum aliaj eĉ tute ne elparolas ĝin. (En iuj bulgaraj dialektoj ankaŭ *x(h)* ĝenerale malaperas: *хоро* — *оро*, *хората* — *опата*, *ходя* — *одя* ktp.). Por ni estas interesa la ortografio de la nomo Христo: ĝi devenas de *Kristo* (religia nomo), kiu havas komencan fonemon *ĥ* (Christ). Sed en pluraj bulgaraj dialektoj *h* estas eliminata kaj oni elparolas Ристо (kiu elparolo en la serba lingvo estas oficiale korekta). Se ni skribos en Esperanto *Hristo* anstataŭ *Ĥristo*, tio ne estus granda eraro, konsiderante la jam kutiman elparolon de *h* kiel *ĥ*.

r

Pri tiu ĉi fonemo ni jam parolis supre.

Duoblaj fonemoj

En Esperanto ne ekzistas preskribo, ke post unu fonemo ne sekvu dua samsona. Tiel ni havas: *instruu*, *enuu*, *karoo* ktp., kaj en kunmetaĵoj: *sennaska*, *dissemi*, *rokkolombo*, *rullevilo* ktp. Do la vorto *finno* ne prezentas escepton de ia neekzistanta regulo. Tamen en iuj lernolibroj (kaj ankaŭ en „Есперантска граматика“ de Oljanov — Vălev) estas aserto, ke en Esperanto ne ekzistas duoblaj konsonantoj. Tia averto povas havi sencon nur por esperantistoj, en kies nacia lingvo oni tradicie skribas duoblajn literojn en latin-devenaj vortoj, kiel en la rusa lingvo: *коммунист*, *конгресс*, *параллельный* ktp. Por bulgaraj esperantistoj tia averto estas absolute nenecesa; neniuj bulgara esperantisto skribus en Esperanto *komunisto*, *kongresso*, *parallela*. Do ne ekzistas malpermeso pri apudeco de du samaj konsonantoj. Sed oni ne devas ignori, ke en vortoj kiel *finno*, *Anna* oni efektive devas elparoli la du samajn konsonantojn (ne *fino*, *Ana*), kiel ni elparolas en bulgara lingvo именно, есенна k. s.

Longaj kaj mallongaj vokaloj

Iuj aŭtoroj de gramatikoj aŭ de pri-lingvaj studoj havas inklinon starigi regulojn pri okazoj, kiam oni elparolu vokalon pli longe. Tiaj reguloj, laŭ mi, ne estas necesaj. Se pro fiziologiaj kaŭzoj aŭ pro bezonoj de intonacio iuj fonemgrupoj trudas plilongigon de vokalelparolo, tio okazas nature, spontane, sen intenco — kaj sen sekvado de ia preskribo. Montrado de la okazoj, kiam aperas tia longigo, povus havi nur konstatan kaj klarigan, ne tamen preskriban karakteron. Ĉe bulgaroj ne

¹ Ĝuste pro tio en la rusa lingvo la fremda *h* ne estas transskribita per *x* (kiel ni faras en la bulgara transskribo), sed per *г* (*g*), kiu laŭ la loko de artikigo kaj laŭ sonado estas plej proksima al *h*: Гюго, Гейнрих, Гейне, Гомер, Гамлет, гипотеза ktp.

estas rimarkata speciala plilongigata elparolo de vokaloj krom ĉe la menciitaj naturaj kondiĉoj.

Eraroj pro nacia elparolo

Nespertaj esperantistoj ofte malatentas la diferencon en la bulgarlingva kaj la esperanta formoj de iuj internaciaj vortoj: *ekskurzo* — anstataŭ *ekskurso*, *sarkazmo* — *sarkasmo*, *entusiasmo* — *entuziasmo* ktp, ankaŭ *idejo* anstataŭ *ideo* k. s.

Fine ni diru ankaŭ kelkajn vortojn pri specialaj okazoj, kiam fiziologia kaŭzo trudas ŝanĝitan sonadon de iuj konsonantoj — plej ofte la grupo *kz* elparolata *gz*: ekzemplo — egzemplo, ekzameno — egzameno (kaj pli malofte *kd* — *gd*: okdek — ogdek, ekdanci — egdanci k. s.).

NI RECENZAS

„МЕТОДИКА НА ОБУЧЕНИЕТО ПО ЕСПЕРАНТО“ („Metodiko de la instruado de Esperanto“) — Ivan Sarafov. Stencilita, bulgarlingva. Bulgara E-Kooperativo. Sofia, 1965, 138 p.

La aŭtoro de la libro signis en la titolo nur unu parton de la instruado, sed li tuŝis ankaŭ la alian parton — la didaktikon, kiu estas intime ligita kun la metodiko. En la libro ĉirkaŭ tiuj du flankoj de la instruado oni pritraktas ankaŭ vicon da aliaj demandoj, teoriaj kaj praktikaj, intime ligitaj kun la instruado de Esperanto.

La instruisto devas solvi du fundamentajn taskojn: 1. Elekti kaj aranĝi bone la instrumaterialon kaj 2. Apliki racion metodon. La celo de la instruado estas kleriga kaj eduka. La aŭtoro konstatas, ke multaj el la lernolibroj de Esperanto ĉe ni ne estas plenvolaraj gvidiloj, ne estas sisteme aranĝitaj kaj metodike verkita. Granda parto de la instruistoj-esperantistoj ne havas la necesan metodikan preparitecon. Interalie la aŭtoro metis antaŭ si la celon forigi tiun mankon en la metodologio de Esperanto kaj tiamaniere altigi la nivelon de la instruado.

En la fonetika evoluo de la lingvoj efikas du faktoroj: *psika* — konscio pri preciza esenco de fonemo en ĝia etimologie pravigata pozicio en la vortobazo, kaj sekve de tia konscio — strebo al ekzakta prononco, kaj aliparte, *fiziologia* faktoro — instinkta inklino kaj prefero al pli facila senpena funkciado de la parolorganoj — kaj la sekvo: ioma ŝanĝo ĉe elparolo de iuj fonemoj. Plej ofte la natura fiziologia faktoro havas superecon kaj trudas la sekvon. En la bulgara lingvo ni elparolas *хляп* kaj ne *хляб*, *бряк* — *бряг*, *град* — *град* ktp. Tiel ni devas akcepti la montritajn devietojn ĉe elparolado de iuj Esperantaj fonemoj sen pedanta insistado pri ekstrema ekzakteco.

A. D. Atanasov — Ada

La instruisto devas koni kiel la procedon mem de la instruado, tiel ankaŭ la metodojn, per kiuj oni atingas klerigan kaj edukan rezulton. La aŭtoro atentigas speciale al la demando pri la preparo de la leciono. Oni atentigas la instruistojn pri la grandeco de la gramatika materialo en la komenca kurso de Esperanto.

Konekse kun la gramatiko staras la demando pri la legaĵoj. Iliaj ekposedon prezentas la esenco de la leciono en la komenca kurso de Esperanto.

En la kurso por progresintoj, kiel en la kurso por instruantoj, oni povas trovi konvenajn, ankaŭ valorajn indikojn. Konekse kun la kleriga celo oni atentigas la kursanojn ankaŭ pri la korespondado, kiu povas helpi ilin lerni la psikon de apartaj popoloj, ekkoni ilian vivon, iliajn pensojn kaj ideojn, kiuj ilin unuigas.

En la libro estas pritrakitaj la fundamentaj didaktikaj principoj, kiujn oni devas apliki ĉe la instruado de Esperanto: demonstracio, ekstera kaj interna konscieco, aktiveco, severa logika ligiteco kaj sistemo en la scioj, esploro de la individuaj kapabloj de la gelernantoj, la scioj estu alireblaj kaj daŭraj, inter ili estu kontinueco. La scioj transformiĝas en scipovojn kaj kutimojn per multfoja ripetado. Tiucele oni devas doni al la gelernantoj celdirektajn ekzercojn.

La aŭtoro pritraktas ankaŭ la demandojn pri la specoj de skribekzercoj, pri skribtaskoj,

pri la specoj de legado, dialogo, tradukado — laŭvorta kaj adekvata.

En la lingvoinstruado la ekposedo de la buŝa parolado prezentas specialan celon. Ĝin oni perceptas per legado kaj parolo kaj per konversacioj je diversaj temoj.

En speciala ĉapitro oni parolas pri lernohelpiloj kaj manieroj, kiujn oni uzas ĉe la instruado. Estas menciitaj ankaŭ la modernaj helpiloj: radio, gramofono, magnetofono, filmoj.

En la lasta ĉapitro la aŭtoro traktas la instruprocedon, la lecionon. Havante antaŭvide la miksitajn aŭ kombinitajn lecionon, li montras ok diversajn elementojn de la instruprocedo.

La laboro de la instruisto estas ju pli sukcesa, des pli bone li sistemigas la materialon kaj utiligas variajn metodikajn manierojn kaj rimedojn. La leciono devas esti anticipe pripensita kaj prilaborita. La instruisto devas scipovi ligi la novan lecionon kun la malnovaj lecionoj; li devas havi ĝustan kaj klaran imagon pri tio, kion li devas instrui. La hejma tasko de la gelernantoj estas bona rimedo por kontrolado de iliaj scioj.

Oni speciale emfazas, ke la laboro de la instruisto estas krea: li altigas la menson kaj edukas, nobligas la karakteron de siaj gelernantoj.

En la fino de la libro estas donitaj kvin modelaj lecionoj.

La temo de la dua leciono estas la korespondado. Ĝin la aŭtoro speciale atentigas. Ĝi donas al la lernanto eblecon ellerni pli grandan nombron da vortoj kaj frazoj, pliriĉigi siajn konojn. La instruprocedo ligiĝas kun certaj demandoj el la sfero de la politiko, de la literaturo kaj de la socialisma konstruado. Tiel la ideo enhavo de la leciono estiĝas pli interesa, pli riĉa kaj edifa.

La aŭtoro de la libro ne sukcesus atingi sian celon, se li ne posedus la nomenklaturon de tiu specialeco. En la sciencaj verkoj la terminologio estas unuaklasa neceso. Mi utiligis

la terminologion, aplikitan de Sarafov, kaj multloke mi uzis liajn esprimojn. Sian grandan sukceson la aŭtoro ŝuldas ankaŭ al sia pedagogia praktiko, al sia persona sperto, kiel ankaŭ al sia amo al la lingvo, kiulin inspiras.

La montritaj avantaĝoj de la „Metodiko de la instruado de Esperanto“ akiras ankoraŭ pli grandan valoron, kiam oni komparas ilin kun la stilo kaj la lingvo de l'aŭtoro. Li disponas riĉan leksikon. Lia stilo estas regula, logika, ĝusta, esprimriĉa, konciza, sen superfluaĵoj. Oni devas noti, ke unu granda sistemo de sciencaj konoj konsistigas la enhavon de tiu malofta libro. En sia strebo kolekti kaj montri en tuteca sistemo ĉiujn difinitajn, sed disĵetitajn sciojn, Sarafov kun mirinda inspiro kaj enviinda fervoro amasigis multajn informojn el la teorio kaj la praktiko, opiniojn de grandaj sciencistoj kaj filozofoj, bibliografion, enreviĝas en meditoj, faras vastajn ĝeneraligojn.

Konante bonege la metodojn de la fremdlingva instruado kaj speciale la metodojn de instruado de Esperanto, Sarafov atingis sian celon. „Metodiko de la instruado de Esperanto“ posedas multajn pozitivajn kvalitojn, kiuj ĝin vicigas sur inda loko en la kampo de la pedagogiaj disciplinoj ĝenerale kaj pli speciale en la kampo de la pedagogia E-literaturo.

Esperanto estas taŭga, jam bonege elprovita lingvo, kiu servas al la homoj el diversaj nacioj en ĉiuj sferoj, en ĉiuj kampoj de agado. Ĝiaj avantaĝoj estas ĝenerale rekonataj, sendubaj.

Estas necese, ke oni enkonduku Esperanton en la sistemon de la lerneja klerigo kaj edukado. Al tio direktas sian socian agadon Ivan Sarafov. Al tiu celo strebas ĉiuj bulgaraj geesperantistoj.

Dobri Jurukov

v. Banja, distrikto de Pazarĝik



G. Konarova — Razgrad: Via materialo tro malfruiĝis. Preskaŭ unu monato forpasis post la okazaĵo, pri kiu vi skribas. Oni ĉiam devas skribi tuj. Ja sen tio nia gazeto terure longe kuŝas en la presejo. Sed via verkmaniero plaĉas al ni. Sendu novajn materialojn!

G. Simeonov — Vidin: Nun la rakonteto pri Avino Marta kaj la paŝtistino ne estas sufiĉe bona. Nenio interesiga estas en ĝia enhavo.

E. Vaskova — Plovdiv: Vi elektis bonan materialon kaj, kiel vi vidas, ni volonte ĝin presigas. Sed kial vi ne sendis ankaŭ la originalon? Ni ne povas kontroli, ĉu la traduko estas ĝusta. Kune kun la tradukaĵo oni ĉiam devas sendi ankaŭ la originalon — ĉu bulgaran, ĉu rusan, ĉu francan aŭ ian ajn.

POR LA MALGRANDAJ ESPERANTISTOJ

OMAŬO

de Ljuba Bojaĝieva

Pro tio, ke milde vi min dormigadis
kaj ofte kanteton al mi vi kantadis;
pro tio, ke vartis min, flegis zorgeme,
la paŝojn unuajn direktis ameme;
ke l' manon malfortan klopode vi tenis,
dum A-B desegni, ho panjo, mi penis,
en via okmarta festtago solena
por vi — tiuj floroj kaj koro plena!

LA ENTREPRENEMA SVETLANA

(Vera okazintaĵo)

Reveninte hejmen la patrino ne kredas siajn okulojn. En la ĉambro staras blanka infanĉareto kaj en ĝi kuŝas bluokula suĉinfano.

La sesjara Svetlana renkontis la patrinon kun ĝojkrio:

— Rigardu, panjo, kian belan knabeton mi trovis. Kaj vi ĉiam nur promesas aĉeti al mi fraton . . .

— Kion vi faris, Sveta? La knabeto ja havas sian panjon kaj nun ŝi certe ploras por li. De kie vi prenis la infanĉareton?

— Apud la magazeno. Tie estis starigitaj du, sed mi elektis la blankan, ĉar ĉi-knabeto pli plaĉis al mi.

Tuj poste la patrino kune kun Svetlana ruligis la infanĉareton al la milicejo.

— Jen estas la knabeto, prenu lin, mi petas. Mia panjo tamen aĉetos al mi fratecon.

V. Vereŝĉagina, USSR

EN LA ZOOPARKO

Amerikana milionulo vizitis zooparkon en granda urbo kun siaj geknaboj. La konduto de la infanoj estis maldeca: ili kuris kaj saltis tra la ĝardeno, kriis kaj incitis la simiojn, ĵetis ŝtonetojn en la kaĝon de la leono, frapis per vergo

PETOLAJ MANETOJ

de Ran Bosilek

Ho, petolaj vi manetoj
kaj turment' por mia kor'!
Petolemas, ho manetoj,
vi sen lac' en ĉiu hor'!

Jen bildeto disŝirita
aŭ flamanta alumer',
jen la ŝranko malfermita
aŭ perdita ŝlosilet'.

Ĉi-matene mi aĉetis
novan pupon kun robet',
sed post kelke da minutoj
ĝi jam restis sen pied'!

Ne ripozas la fingretoj —
ĉiuhore tiras min.
Ah, petolaj vi manetoj,
dolĉe vi turmentas min!

Pro manetoj petolemaj
ne ripozas la patrin'.
Malgraŭ tio, tre feliĉa,
ilin kisas ŝi sen fin'!

Ĉar ŝi scias: petolemas
ĉiu bebo kaj infan'.
Venos tempo, kiam helpos
al ŝi junulina man'.

El bulgara: Dinko Ŝiŝkov

la elefanton. Fine la knabino diris al sia patro:

— Al mi tre plaĉas la bestoj. Ĉu vi povus aĉeti al mi simion?

Kaj la knabo petis:

— Paĉjo, aĉetu al mi la leonon kaj la tigron!

Do, la patro direktis sin al la gardisto de la zooparko kaj diris al li:

— Miaj infanoj treege ŝatas viajn bestojn. Mi deziras aĉeti ilin. Kiom da dolaroj kostas la bestoj?

— Ne, ni ne vendas niajn bestojn — respondis la gardisto. — Sed viajn geknabojn ni povus aĉeti por nia zooparko.

PRESERAROJ

1. La ministro portis en la mano grizan martelon kaj nigrajn gentojn.
2. La maljunulo prenis sian pupon kaj metis ĝin en la bulon.
3. Antaŭ sia morto la patro venigis siajn filikojn kaj banis ilin.
4. La ĉarma kaj bela kantistino razis

ĉiujn aŭskultantojn en la urbodomo.
5. Li trovis ŝin en tre bona banstato.
Ni petas, korektu la erarojn!

Respondo al la vortludoj en n-ro 12/1968

ano — banano, beno — bobeno, falko — kafa-
falko, urso — konkurso, rizo — krizo.

DisTroj

PRI LA MALNOVAJ ANEKDOTOJ

— Kial vi levas vian ĉapelon, kiam mi rakontas anekdoton al vi?

— Ĝi estas mia maniero saluti malnovajn konatulojn.

DELIKATECO

Instruisto: Miĉjo, kiom aĝa estas persono naskiĝinta en 1928-a?

Miĉjo: Ĉu viro aŭ virino?

CERTECO

— Doktoro, respondu al mi tute sincere: ĉu vi povas resanigi min?

— Sendube. La statistiko diras, ke en okazoj kiel la via, el cent malsanuloj resaniĝas unu.

— ???

— Vi estas ĝuste la centa, kiun mi kuracas. La ceteraj 99 mortis.

El hispana:
D. H.



al via konjektemo

1. Estinta. 2. Manĝaĵo, kiu en sia plej granda kvanto estas akvo. 3. Adverbo esprimanta kvanton aŭ gradon superan al ĉiuj aliaj. 4. Ebena limiganta volumenaĵo. 5. Hispana sporta societo. 6. Malsaneca ruĝa ŝvelaĵeto sur la haŭto. 7. Najlo por metalaj pecoj. 8. Unu el la korelativaj vortoj.

Se vi metos la ĝustajn vortojn ĉirkaŭ la ciferojn, vi ricevos en la meza kolono la nomon de tio, kio estas plej kara por la esperantistoj.

Petro Stoïčkov

KONCIZE

● La 40-a Itala Kongreso de Esperanto okazos en Como de 13 ĝis la 18 de septembro 1969. Adreso: Esperantista Grupo „Esperia“, Via Diaz 26—22100, Como, Italio.

● En N^o 6/1968 de „La Internacia Fervojisto“, organo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, estas presita la fakprelego „Enkonduko de la elektra kaj dizela trakcio en Bulgaraj Ŝtataj Fervojoj“, kiun inĝ. Simeon Simeonov faris dum la 20-a kongreso de IFEF en Varna (1968). La fakprelego estas verkita de inĝ. Emil Petrov, inĝ. Simeon Simeonov

kaj ing. Veselin Veličkov de la Sciencia Esplora Instituto pri Transporto. Sur la kovrilpaĝo de tiu numero de „La Internacia Fervojisto“ estas granda foto de bulgara dizelmotortrajno por antaŭurba trafiko.

● La lasta, 177-a numero (1968) de „Paco“ — oficiala organo de la Mondpaca Esperantista Movado, eldonita de la Japana MEM-Sekcio enhavas multajn materialojn pri k-do Jui-Ĉunoŝin, japana malnova esperantisto kaj aktivulo de MEM, kiu sin bruligis antaŭ la oficiala domo de la japana ĉefministro Sato la 11-an de novembro 1967 j. Per sia membruligo Jui - Ĉunoŝin protestis kontraŭ Sato kaj la usona prezidanto Johnson, kiuj daŭrigas militan okupon de Okinaŭa kaj agresmiliton al Vjetnamio. La numero de „Paco“ enhavas ankaŭ aliajn kontraŭmilitajn kaj kontraŭimperiismajn materialojn.

● La japana sekcio de Mondpaca E-Movado donacis al VPEA (Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio) skribmaŝinon, elektran mimeografmaŝinon kaj materialojn por mimeografio, por helpi ties eldonan agadon. Por tiu celo la Sekcio kolektis 200 mil enojn inter ne nur esperantistoj, sed ankaŭ neesperantistoj.

● Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio organizos en 1969 ekspozicion sufiĉe ampleksan sub la titolo „La Esperantista Mondo subtenas nin kontraŭ la usona agreso“.

Nekrologoj

La 5-an de decembro 1968 j. forpasis en sia 78-jara aĝo en La Havano, Kubo

d-ro Antonio Aleman Ruiz

Li estis unu el la plej grandaj pioniroj de la E-Movado tutmonde, fondinto de la unua Landa E-Asocio en Kubo kaj de la revuo „Latinamerika Esperantisto“. Sian tutan vivon d-ro Antonio Ruiz dediĉis al Esperanto kaj E-Movado.

TRA LA GAZETARO

En la libro „*Transversa tranĉo*“ de Zdravko Srebrov, Sofio, (1967), en la artikolo „Mia vivo“ de Trifon Ĥristovski la aŭtoro parolas ankaŭ pri la granda amo de Ĥristovski al Esperanto, dank' al kiu li sukcesis plivastigi

La 16-an de januaro 1969 forpasis 58-jara la honora prezidanto de E-Societo „Lumo“ en v. Borovo, distrikto de Ruse,

Mitju Ivanov Mitev

Pro sia aktiva partopreno en la kontraŭfaŝisma batalo li estas honorita per ordeno „Popola Libero“ — II grado.

Je la 3-a de februaro 1969 j. forpasis post longa malsanado

Aleksandro Angelov Gerasimov

62-jara, membro de la Distrikta Komitato de BEA kaj prezidanto de E-Societo „Espero“ ĉe la Fervojista Administrejo — Plovdiv.

La 16-an de marto 1969 j. en Burgas mortis 66-jara la ano de E-Societo „Nigra Maro“

Argir Andonov

Kiel lernanto en la gimnazio de Karnobat Andonov eklaboris por Esperanto. Poste li estis aktivulo, longjara sekretario kaj prezidanto de E-Societo „Nigra Maro“ — Burgas. Lastatempe li estis prezidanto de la Distrikta Komitato kaj membro de CK de BEA.

Argir Andonov dum sia tuta vivo senlace laboris por la ideo pri paco, solidareco kaj amikeco inter la popoloj.

La 16-an de marto 1969 en Sofio mortis la konata esperantisto, aktiva socia aganto kaj ne-lacigebla kooperativano

Todor P. Daskalov

el vilaĝo Bratja Daskalovi, distrikto de Stara Zagora. En la daŭro de kelkaj jaroj li estis membro de la Kontrolo Komisiono de Bulgara Esperantista Kooperativo kaj laboris aktive por ĝia stabiligo.

siajn rilatojn kun la mondo kaj pliriĉigi sian verkaron.

En j. „*Oteĉestven Glas*“ — Plovdiv (28. VI. 1968): redakcia enketo sub titolo „La plej granda deziro“ en ligo kun la IX Tutmonda Festivalo de Junularo kaj Studentoj. Unua inter enketitoj, kiuj respondas al la supra demando, estas Nikolaj Bojaĝiev el Plovdiv —

Ĉefredaktoro: Kunĉo VALEV

Redakta komitato: Tatjana EVSTRATIEVA, Atanas LAKOV, Venelin MITEV, Ivan SARAFOV, Simeon D. SIMEONOV, Petr TODOROV.

Korektis: Vasja Petrova

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 83-26-82

delegito de Bulgara E-Junularo por la Festivalo (kun portreto).

En ĵ. „**Zarja na Komunizma**“ — Loveĉ (20. VIII. 1968) — informo de Coĉo Kolarov pri kurso de Esperanto en vilaĝo Borima, distrikto de Loveĉ.

En la sama ĵurnalo (21. IX. 1968) — informo pri plenkunsido de la Distrikta Komitato de BEA en Loveĉ — je la 18. IX. 1968.

En la sama ĵurnalo (3. X. kaj 5. X. 1968) oni publikigas la rakonton „Patra tero“, tradukitan el Esperanto de K. Kalĉev.

En revuo „**Semejstvo i Uĉilište**“ („Familio kaj Lernejo“) n-ro 10/1968 oni publikigis la artikolon „La unuaj kvar jaroj“ de Ralf Markarian tradukitan de Boris Simeonov el „Esperanto“ n-ro 6/1966.

En ĵ. „**Naroden Drugar**“ — Jambol (12. X. 1968) — artikolo „Sub la signo de la Verda E-stelo“. La aŭtoro Konstantin Kavargikov rakontas pri E-ekskurso en Rumanio (Bukureŝto), USSR (Lvov), Pollando (Varsovio kaj Krakovo), Hungario (Budapeŝto).

En la sama ĵurnalo (19. XI. 1968) — informo de Atanas Ivanov „Sukcesoj de la esperantistoj el Jambol“: ke multaj filatelistoj-esperantistoj el Jambol, patroprenintaj en la II nacia filatela ekspozicio en Sofio, ricevis medalojn kaj diplomojn.

En ĵ. „**Dunavska Pravda**“ — Ruse (20. X. 1968) — informo de S. Ĉernaev pri la III nacia konferenco de la studentoj-esperantistoj en Ruse.

En ĵ. „**Veĉerni Novini**“ (17. X. 1968) sciigo, ke la Centra Domo de la Instruisto daŭrigas la kurson de Esperanto por instruistoj.

En ĵ. „**Pogled**“ — Sofio (11. XI. 1968) en intervjuo kun la prezidanto de la Asocio de Bulgaraj Arkitektoj docento M. Pisarski oni mencias Esperanton komparante ĝin kun la naturaj lingvoj.

En ĵ. „**Trojanski Glas**“ (11. XII. 1968) — du artikoloj: „Unu poŝtmarko disportas tutmonde la nomon de Trojan“ de Lalju Lalev — pri la sukcesa agado de E-societo „Balkana Stelo“ en urbo Trojan kaj „Kiu estas d-ro Zamenhof“ — okaze de la 109-a naskiĝtago de d-ro L. L. Zamenhof.

En la sama ĵurnalo (25. XII. 1968) — raportajeto de Totju Enev „Celebro de d-ro Zamenhof“.

En la sama ĵurnalo (26. XII. 1968) — sub titolo „Granda kaj hela rememoro“ estas presita granda fragmento el letero de la sveda esperantisto Oke Blumberg, vizitinta nian landon kiel gasto de siaj bulgaraj amikoj-esperantistoj en Dimitrovgrad kaj Stara Zagora. Blumberg parolas kun amo kaj admiro pri la majestaj atingoj de nia socialisma konstruado.

DEZIRAS KORESPONDI

Belgio

Jean Brixhe (arkeologo), rue des Combattants, Dison.

Blanche Melin (40-jara), rue du Prince 55, Verviers.

Bernadette van Cluysen, Pce J. Roggeman 36, Dison.

Francoise Guyot, rue Xhrouet, SPA.

Bulgario

Ivan Petkov Keranov (19-jara fraŭlo), urbo Tutrakan, str. Nazam Hikmet 27 — kun la tuta mondo pri ĉt. Respondo certa.

Sliven, Tubbolnica, d-ro Todor Jankov (40-jara) dez. kor. kun samideanoj kaj samideaninoj el Germanio, Anglio kaj Italio.

Sofia, POB 497, Lasto Nikov, studento kaj filatelisto — dez. kor. kun ĉl.

Sofia, Alabin 42, Ivanka Il. Banska — kun ĉl pri ĉt.

GDR

Junaj germanaj esperantistoj dez. kor. kaj interŝanĝi PK kun E-teksto. Komuna adreso: Ernst Muthschall, 402 — Halle/s Am Bergmannstrost 18.

Hispanio

Se vi posedas antaŭmilitajn numerojn de „Bulgara Esperantisto“ bonvolu skribi al s-ro Ramon Molera — str. Joaquina 13 — Moyá, Barcelona.

Hungario

Margareta Sándor, Budapest VII, Rumbach Sebestyén u. 15. V. 2.

Pollando

Renata Cieslak (10-jara), Warszawa 12, str. Jaroslawa Dabrowskiego 73 m 41, dez. kor. kun bulgaraj geknaboj.

St. Przybylak, ul. Wyzwolenia 35/37 — bl. 33, Piotrków Tryb., voj. Lodskie.

Halina Karwatka (17-jara), Wolsztyn Wikip, ul. R. Koccha 39/5.

Widolt Konarewski (25-jara), Czeszochowa, ul. Warszawska 46 m. 11.

Tadeusz Rajizgusz (22-jara), Chorzov II, ul. Kircpova 8/5, voj. Katowice.

Marek Trzcinski, Warszawa, Nowolipje 17A m 11.

Wykoi Zbigniew (18-jara), Babimost, ul. Kavgowskoi 15/4, voj. Z. Gora, pow. Sulchow.

Stanislao Zajac, Katowice 14, str. Korczaka 53/30.

Sovetunio

Kiev 30, Poŝtkesto 644, E-Rondo, Lineckaja Margarita.

Melkova Ljudmila, Achinsk, Krasnojarskij kraj, II mikrorajon, 16—60 — kun Hispanio, Kubo, Argentino k. a.

Rostov-Don 12, Seĉenova 8, kv. 46, Melnikov Alik.